

ISSN 0023-3692

KONTAKTO

numero 244 (2011:4)

La Blaga Blogo
Blogo de naĝisto

Polemiko
Ne al atomenergio

Facila
Ĉu ni jam perdis la infanecon?



Interreto

Libereco aŭ dependeco?

Sam Green: Utopio en la plej nobla senco



tejo

Tutmonda Esperantista
Junulara Organizo



tejo.org



MANĜI, TRINKI KAJ MEMBRI EN TEJO

Tri bazaj nepraĵoj por povi ĝui la vivon. Ni provu menciigi kelkajn kialojn, kial bonas esti individua membro en TEJO, kvankam ili multegas: Vi estas en kontakto kun tutmonda juna E-komunumo; malkovriĝos al vi bunta kultura diverseco pere de la renovigita revuo Kontakto, kiun ĉiu membro ricevadas; tutmonde gastigas kaj gastas pere de Pasporta Servo kaj vi ankaŭ povas pli favore preze aliĝi al IJK, la plej granda renkontiĝo de junaj esperantistoj el la tuta mondo.



Ĉion pri aliĝo al TEJO vi trovas ĉe:

<http://www.tejo.org/eo/membrigho>



Dumonata socikultura revuo de **Tutmonda Esperantista Junulara Organizo** (TEJO), eldonata de **Universala Esperanto-Asocio** (UEA).

Fondita en 1963.

N-ro 244 (2011:4), 46-a jarkolekto

ISSN 0023-3692.

Legata en ĉ. 90 landoj.

TTT-paĝo: <http://kontakto.tejo.org>.

Eldonanto (administrado, abonoj, anoncoj): UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; tel.: +31 10 436 10 44, fakso: +31 10 436 17 51; ret-adreso: <uea@co.uea.org>.

Redakcio: Kontakto, Rua José Guidini Jr, 229, Ribeirão Preto, SP, Brazilo, 14093-540 <kontakto@tejo.org>

Redaktoro: Rogener Pavinski

Enpaĝigo: Romulo Felicio

Korektado: Rob Moerbeek kaj Manuela Ronco (teknika helpo)

Presado: Skonpres, Bydgoszcz (Pollando), <skonpres@poczta.onet.pl>

Konstantaj kunlaborantoj: Aleksander Osincev (Rusio), Alexandre Baudry (Francio), Olubunmi Osho-Davies (Niĝerio), Victor Solé (Katalunio), Simmon K. Barney (Usono), Etsuo Miyoshi (Japanio), Ivo Miesen (Nederlando), Vasile Gavrilan (Moldavio). Facilingvaj artikoloj estas verkitaj en la niveloj tre facila kaj facila, laŭ la vortolisto de Kontakto. Tiu listo troviĝas en nia retpaĝo.

Anoncarifto: tutpaĝa 350 EUR, 1/2-paĝa 190 EUR, 1/4-paĝa 100 EUR, 1/8-paĝa 55 EUR, 1/16-paĝa 30 EUR. Anoncoj sur kovrilpaĝoj kostas duoble. Por E-organizaĵoj 50% da rabato. Varbantoj de ekstermovadaj anoncoj ricevas makleraĵon de 30%. Por anoncoj bv. kontakti UEA.

Anoncetoj: por Anonctabulo 0,25 EUR por unu vorto. Bv. sendi rekte al la redakcio aŭ al UEA.

Abontarifo: Varias laŭlande. Kontrolu ĉe nia retejo.

Malfortvidantoj: Estas kelkaj voĉlegitaj artikoloj en nia retejo. Pliajn oni povas peti de Vasile Gavrilan <pangavrilan@gmail.com>. Kasedlegantoj sendu po du kasedojn de 90 minutoj al Rob Moerbeek, Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk, Nederlando. Kun la poŝta glumarko de "Cécogramme" (viro kun blanka bastono).

Kontakto en radioj: Radio 3ZZZ: <http://www.3zzz.com.au/>



ĜD Edukado kaj Kulturo


Tiu ĉi eldono estas financita kun subteno de la Eŭropa Komisiono. La publikaĵo tamen nur reflektas la vidpunkton de la unuopaj aŭtoroj, kaj la Eŭropa Komisiono neniel respondecas pri ajna uzo de la informoj.

La redakcio kaj la eldonanto ne respondecas pri la opinioj de unuopaj aŭtoroj.

Redakcie

Saluton karaj legantoj!

Certe eĉ antaŭ ol ricevi tiun ĉi revuon paperan, kelkaj el vi jam elŝutis la ciferecan eldonon kaj ĝuste nun foliumas ĝin, nur momenton post kiam ĝi estis enretigita. Jen unu el la mirakloj de Interreto, kiu ebligas tiom rapide interŝanĝi informojn sur la tuta terglobo.



Interreto estas do la temo de niaj ĉefartikoloj ĉi-eldone. La bono kaj malbono de la teknologio, kiun neniuj plu povas preteratenti. Ĝi jam ludas ĉefan rolon ĉe politikaj kaj sociaj ŝanĝoj en la mondo. Ĉu kiel ilo por veraj revolucioj kiel tiuj en arabaj landoj ĉu kiel la okcidentaj verŝajnaj "klakprotestoj" el niaj komfortaj seĝoj. Memkritike pri tiu cifereca revolucio argumentas la artikolo de Leonardo Janz. Sergio Tyrin pritraktas la liberecon en Interreto, kiu estas ne tre amike rigardata de registaroj en kelkaj landoj — ili planas enkonduki novajn regulojn por limigi tiun liberecon. Kun tiom da profiloj kaj personaj informoj ĉe la reto, kio okazos al ili kiam vi mortos? Ana Ribeiro rakontas al vi; kaj se vi volas tuj mortigi vian retan vivon ni ankaŭ povas helpi.

En nia intervju rubriko unuafoje estas ne-esperantisto; tamen la rilato, kiun havas nia intervjuato kun Esperanto estas granda kaj grava kiel oni vidas malofte. Sam Green, la reĝisoro de "Utopio en 4 Movimentoj" ĵus lanĉis duan filmprojekton pri Esperanto: "La Universala Lingvo" kaj afable respondis niajn demandojn pri ambaŭ projektoj, pri Esperanto kaj pri si mem. Ankaŭ recenzon de "La Universala Lingvo", samkiel pri libro de Sen Rodin kaj ko-diskoj de Vinilkosmo, kiel dua volumo de la Hiphopa Kompilo kaj lasta de Jacques Yvart, vi trovos ĉi-eldone.

Foje ni ricevas komenton pri iu artikolo, sed pli kontentige estas kiam ni ricevas reago-artikolon, kia estas la artikolo de Dieter Rooke kontraŭ atomenergio. Nekredeblaĵoj estas la temo de nia rubriko NKD — sendube ĝi iel gapigos vin. En la Blaga Blogoj vi legos amuzan rakonton pri naĝisto, kiu estas forgesemulo, kaj pri perdo de la infaneco far la modernaj infanoj vi legos en la facila rubriko — ĉio ĉi aldone al movadaj novaĵoj el TEJO-Tutmonde.

Ni esperas ke ĉi tiu numero plaĉos al vi samkiel al ni. Multaj novaĵoj estas planataj por baldaŭa estonto. Restu nia kontakto kaj ni restos via Kontakto!

Rogener PAVINSKI

ENHAVO

Reagoj, novaĵoj	4
Intervjuo Sam Green - Utopio en la plej nobla senco	5
La blaga blogo Blogoj de naĝisto	9
Ĉefartikolo Interreto - Libereco aŭ dependeco?	10
Memkritike pri la cifereca revolucio	11
"Civilizita Interreto" - Ĉu detruante la liberecon de la Reto?	12
Kio okazos kun via "Interreta vivo" kiam vi mortos?	14
Krucenigmo	15
Facila Ĉu ni jam perdis la infanecon?	15
Rezenzoj	16
NKD	18
Polemiko Ne al atomenergio	19
TEJO tutmonde	20



Viaj reagoj kaj komentoj estas bonvenaj. Kontaktu nin per la retadreso kontakto@tejo.org

Mi legis en lasta Kontakto du verkojn, kiujn mi kvazaŭ jam legis ekster Esperantujo: Pri moderna drogo skribis Vladimir Sorokin kaj pri kuketoj Douglas Adams. Mi iom seniluziiĝis pri la kreemo de niaj verkistoj.

Paulína - Slovakio

Tiom da religioj havas rilaton al Esperanto kaj esperantistoj tiom malmulte konscias pri tio.

Pro tio mi volas proponi al vi la temo "Esperanto kaj religio(j)".

Felix - Germanio

Temo-sugestoj

Ĉu vi ŝatus verki por Kontakto, sed mankas inspiro?

Ni proponas al vi kelkajn temojn kiel sugestojn pri artikoloj por venontaj numeroj de Kontakto. Sentu vin libera ankaŭ por fari proponojn. Ni bonvenigas vian partoprenon!

Jen sube la aktualaj temo-sugestoj: (pliaj detaloj pri ili troviĝas en nia retejo kontakto.tejo.org)

#Facila teksto

Kontakto ĉiam bonvenigas facillingvajn artikolojn pri kiu ajn temo. Legu detalojn kiel verki facillingve en nia retejo.

#Konsumismo

Ĉu vi aĉetas superflujajn varojn? Ĉu konsumismo helpas disvolviĝon aŭ malsanigas la socion?

#Drogoj

Kiel oni konsciigu pri iliaj danĝeroj? Ĉu la malpermeso estas efika? Ĉu laŭleĝigi ilin estas la plej bona solvo?

#Recikligo kaj rubaĵoj

La destino de rubaĵoj estas akuta problemo en nia nuntempa socio. Recikligo fariĝas pli kaj pli grava kaj necesa en la mondo.

#Tabako

Malgraŭ la nuntempa provo sieĝi ĝian reklamadon kaj konsumadon, cigaredoj estas unu el la plej vendataj produktoj en la mondo.

#Polemikaj tradicioj

Ĉu en via lando aŭ regiono ekzistas polemikaj tradicioj, kiuj ne plu kongruas kun la ĉirkaŭaĵo aŭ kiuj vekas kritikojn el parto de la socio?

#Astrologio

Sciencistoj rigardas la stelaŭguradon kiel ŝajnskiencon aŭ superstiĉon. Kaj vi, kion vi opinias pri la temo?

#Hejmbestoj

Kian rolon havas la hejmbestoj en la homa vivo?

#Ĉu mono ŝanĝas la homon?

Ĉu vi konas personon, kiu draste ŝanĝiĝis pro riĉiĝo aŭ povo-akiro?

NOVAĴOJ

Incendio ĉe Vinilkosmo



Dum la nokto de la 18a/19a de septembro Donneville, Francio fajrego startis en la ekzercejo n° 7 de Vinilkosmo kie ankaŭ estas la stokejo de la sonmaterialo por sonsistemo kaj registrejo, kaj ankaŭ granda parto de la stoko de diskaj eldonitaj de Vinilkosmo. Ni ege bedaŭras tiun tragedian akcidenton kaj alvokas niajn legantojn apogi la eldonejon.

Kontakto-podkasto

Revuo Kontakto kun la nova radio-projekto Muzaiko (<http://muzaiko.info>) serĉas kunlaborantojn por krei podkaston programon kun intervjuoj kaj diskutoj pri la enhavo de la revuo aŭ ĉefartikoloj. La programo estas en la fazo de planado kaj ni bonvenigas ideojn. Se vi ŝatus kunlabori, kontaktu nin.

Facila Vortlisto

Anna Löwenstein, kiu kreis la facilan vortliston de Kontakto antaŭ proksimume 30 jaroj decidis ĝisdatigi ĝin kaj aldoni kelkajn radikojn kiel ekz. ekran-, klak-, klav- kaj mesaĝ-. "Kiam mi kreis la liston, Interreto ankoraŭ ne ekzistis, do mankas en ĝi ĉiuj vortoj ligitaj kun tiu koncepto." La aktualigita versio de la facila vortlisto de Kontakto baldaŭ aperos en nia retejo.

Sam Green

Utopio en la plej nobla senco

ROGENER PAVINSKI (BRAZILIO)

INTERVJUO

Ĉu Esperanto estas utopio?

La utopieco de Esperanto estas jam malnova temo, sed verŝajne neniam ĝi estis traktata kiel nun. La motivo estas ke lastatempe Esperanto rolas en grandaj ekranoj tra la mondo kiel studobjekto de la usona ĵurnalisto kaj dokumentfilma reĝisoro Sam Green. Lia projekto "Utopia in Four Movements" (Utopio en Kvar Movimentoj) kaj lia plej lasta dokumentfilmo, "The Universal Language" (La Universala Lingvo), ambaŭ pritraktas Esperanton.

Meze de la 2000-jaroj, estis konate ke Green laboras pri filmo-projekto kiu inkludis Esperanton, kaj tial estis granda la atendo de la esperantistoj por "Utopio", la "viva dokumentfilmo", dividita laŭ 4 partoj, kiu aperis pasintjare. Sed ĉar nur malmultaj esperantistoj povis fizike spekti ĝin, la cetero kontentiĝis nur per iu neoficiala reta elĉerpaĵo aŭ per la komentoj de aliaj.

Kvankam ĝi estis bonege akceptita de la ĝenerala publiko en filmfestivaloj, ĝi ne ricevis nur laŭdojn de esperantistoj. Estis tiuj, kiuj kritikis la filmon pro tio ke ĝi neglektas la nuntempan Esperanto-movadon kaj prezentas la lingvon kiel ion, kio malsukcesis. Ne estas klare ĉu Green, antaŭ "Utopio" mem, jam havis planojn fari duan projekton pri Esperanto, sed lia plej lasta kaj ĵus lanĉita dokumentfilmo "The Universal Language" (La Universala Lingvo), estas iel daŭrigo de la laboro komencita en "Utopio", kiu profitas per ĝiaj materialoj sed utiligas ilin pli pozitive ol antaŭe.

Sam Green estas renoma dokumentfilmisto, lia filmo "The Weather Underground" ("La Subgrunda Tempo" laŭ libera traduko) estis nomumita por Oskar-premio en 2004. Nuntempe li instruas filmon kaj videon ĉe la Arta Instituto en la Universitato de San-Francisko, kie koincide aŭ ne, en lastaj jardekoj estas la plej forta regiono por la Esperanto-movado en Usono.

Ne estas dubo ke liaj filmoj reprezentas grandan paŝon por Esperanto. Laŭ li okazas ondo de intereso pri la lingvo kiam la ne-esperantistoj pli serioze rigardas la lingvon - liaj filmoj estas parto de tiu fenomeno. Samtempe, de ekstere li klarvidas (kaj tio entute ne estas sekreto) kiel malbone propagandas sin la Esperanta movado. Green estas entuziasmo kaj profunde kredas ke la mondo povas pliboniĝi parte danke al la utopioj - ideoj, kiuj elvokas la bonon. Esperanto estas unu el tiuj ideoj - Jes, utopio en la plej nobla senco.

Sam Green dum viva prezento de
"Utopio en 4 movimentoj"

Kontakto: Eĉ antaŭ ol "La Universala Lingvo", Esperanto grave rolis en via projekto "Utopia in 4 Movements". El kie venis la intereso trakti tiun temon?

Sam Green: Mi jam havas intereson pri Esperanto delonge. Mi ne memoras precize kiam mi unue aŭdis pri la lingvo - verŝajne mi legis pri ĝi ie. Mi ĉiam supozis ke ĝi estas relative lastatempa - kreita en la 50-aj jaroj aŭ proksime. Antaŭ kelkaj jaroj mi ekvidis ion, kio klarigis al mi la historion de la lingvo kaj la movado ĉirkaŭ ĝi, kaj tio vere tuŝis min.

Komence mi alproksimiĝis al Esperanto pro tio, kion ĝi reprezentas rilate al espero kaj socia ŝanĝo. Mi estas politika homo - Mi revas pri pli bona mondo kie socioj povas esti konstruataj ĉirkaŭ paco, egaleco kaj divido de naturrimoj, kaj Esperanto elvokas tion. La mondo hodiaŭ povas esti deprima loko - ne ĉiam estas facile konservi esperon - kaj tial min allogas utopiaj projektoj kaj movadoj. Ili memorigas al ni pri la ebloj kaj tio estas por mi profunde grava afero. Mi scias ke kelkaj espe-



Sam Green dum filmado

rantistoj vere ne volas konsideri la lingvon kiel utopion, kaj mi scias ke tio reprezentas multajn aferojn por malsamaj personoj. Mi komprenas ke por kelkaj esperantistoj ĝi estas bonega maniero por komuniki kun "plum-amikoj" aŭ renkontiĝi kun homoj dum vojaĝado, sed mi ja pensas ke ĉe la kerno de la Zamenhofa revo pri la lingvo estas io utopia, kaj mi diras tion kun la plej bona signifo de la vorto. Mi konstatas kaj sentas ke por kelkaj esperantistoj la vorto "Utopia" estas negativa kaj io evitinda, sed por mi ĝi estas mirinda kaj valora ideo.

Kial vi decidis fari duan filmon pri la sama temo?

La unua projekto, kiun mi faris pri Esperanto estas "viva dokumentfilmo" nomata "Utopia in Four Movements" (Utopio en Kvar Movimentoj), kiu temas precipe pri kelkaj el la ideoj menciitaj supre. La verko rigardis al kvar malsimilaj historioj, kiuj pritrakas utopion iumanierne. Kun tiu projekto mi volis levi subtilajn demandojn, kial ni ne plu vivas en utopia erao kaj kion tio diras pri tio kio ni estas nuntempe. Do, unu el la partoj de tiu pli granda laboro temas pri Esperanto, alia pri la plej granda aĉetcentro en la mondo, la tria parto estas pri la revolucia ideo kaj pri revolucia usonano kiu loĝas en Kubo. La maniero en kiu tiu dokumentfilmo funkcias, estas ke mi ĉeeste rakontas ĝin kaj muzik-grupo ludas fone, dum la filmo estas surekranigata. La filmo ekzistas nun en tiu viva formo. Ĝi kvazaŭ estas miksaĵo inter filmo kaj arta prezento. Ni prezentis ĝin tiel ĉirkaŭ la tuta mondo – en Varsovio, Istanbul,

Amsterdamo, Kanado kaj en multaj lokoj en Usono.

La materialo (filmado kaj intervjuoj) en "La Universala Lingvo", estas baze la sama, kiun vi uzis por krei "Utopia". Ĉu "Universal Language" estas nur kromprodukto de "Utopia"?

Estas iom da komunaj trajtoj inter la du projektoj, sed ankaŭ estas multaj malsimilaĵoj. Mi mem rakontas "Utopion" tiel ke ĉiuj miaj pensoj kaj komentoj pri Esperanto venas de mi. En "La Universala Lingvo" mi entute ne estas kaj la historio de Esperanto estas rakontata per intervjuoj kun kelkaj signifaj homoj en la Esperanto-movado – Renato Corsetti, Humphrey Tonkin kaj Arika Okrent – do la filmo respegulas plej

"Utopio por mi estas mirinda kaj valora ideo"

multe iliajn ideojn. "La Universala Lingvo" ankaŭ estas pli longa ol la Esperanto-parto en "Utopia", do estas pli da materialo tie.

Ĉu vi ankaŭ utiligos la alite-majn materialojn el "Utopia" por krei memstarajn filmojn pri tiuj temoj?

Mi fakte prenis ĉion, kion mi filmis pri la plej granda aĉetcentro en Ĉinio kaj produktis memstaran mallongfilmon antaŭ kelkaj jaroj [1]. Tiu ĉi peco iom malpli rigardas al aĉetcentroj kaj vendejaroj ĝenerale kiel io utopia kaj traktas precipe nur tiun aĉetcentron kaj la historion ĉirkaŭ ĝi.

Kiel disvolviĝis la esplora fazo por "La Universala Lingvo"?

Mi havas ĵurnalisman fonon, do mi vere amas esplori kaj serĉadi. En tiu ĉi projekto specife – ĉar mi ne estas esperantisto – ŝajnis al mi grave pasigi signife longan tempon

provante lerni pri Esperanto, pri la historio de la lingvo kaj pri la aktuala movado. Tiel dum la tempo, mia perspektivo kreskis kaj espereble mi fariĝis pli aktuale informata. Mi iris al tri Universalaj Kongresoj: en Florenco, Jokohamo kaj Roterdamo kaj parolis kun pluraj esperantistoj tie. Mi ankaŭ klopodis paroli kun kiel eble plej multaj "spertuloj". Mi iris al la admirinda Esperanto-Muzeo en Vieno kaj faris esploron dum pluraj tagoj. Tiam mi ankaŭ klopodis aŭdi malsimilajn esperantistojn kaj informiĝi pri iliaj vidpunktoj. Kompreneble, ekzistas probable tiom da vidpunktoj pri la lingvo kiom da Esperanto-parolantoj! Kion mi provis fari estas sintezi ĉion, kion mi lernis pri Esperanto dum la pasintaj jaroj kaj paroli pri la lingvo laŭ maniero plej justa kaj ĝusta kiel eblis.

Ĉu la scenaro ŝanĝiĝis dum la konkretigo de la filmo?

Filmfarado estas komplika; kia Filmfarado estas komplika; kiam vi muntas dokumentfilmon, estas multaj aferoj, kiujn vi volas aldoni, sed ne ĉio funkcias laŭ filma senco. Ekzistas kelkaj aferoj, kiuj povas esti interesaj, aŭ eĉ gravaj, sed se vi ne povas fari ke tiu parto plene funkcii surekrane, vi probable ne enmetos ĝin. Verdire, kiam mi faras filmon, mi volas ke la spektanto restu kaptita de la komenco ĝis la fino kaj volu spekti. Do ĉi-kaze estis kelkaj historiaj aferoj, kiujn mi dezirus enmeti sed mi ne sukcesis funkciigi ilin – kutime ĉar mi ne trovis sufiĉe da filmmaterialo. La historio pri Moresnet, ekzemple – la landeto proksime al Belgio, kiu planis adopti Esperanton kiel oficialan lingvon en la komenco de la 20-a jarcento. Mi



Green alproksimiĝis al Esperanto kiel admiranto



"The Weather Underground", nomumita por Oskar-premio

simple ne povis trovi bonajn bildojn por enmeti tion. Mi ankaŭ enmetus pli pri Zamenhof, sed kiel vi scias, krom pozaj fotografaĵoj, ne estas multaj bildoj liaj. Do, kion mi celas diri estas ke oni decidas kiom multe da historio iu filmo havos nur dum la munta fazo.

En "La Universala Lingvo" estis intervjuitaj nur homoj, kiuj favoras al Esperanto. Kial ne kontraŭuloj?

Tio estas bona demando. Mi vere neniam pripensis inkludi kontraŭulojn al Esperanto en la filmo. Mi vere ne provis doni iun ekvilibron kiel en ia televidnovaĵa programo. Mi kredas ke multaj ne-esperantistoj jam estas skeptikaj pri la lingvo. Do mia espero ĉi tie estas malfermi iliajn pensojn pri Esperanto. Mi ne faras iun propagandan filmon aŭ similan - "La Universala Lingvo" estas pozitiva portreto sed ankaŭ kritika en iu maniero. Sed ĝenerale, mi ne kredas ke inkludi Esperanto-kontraŭulojn vere aldonus ion al ĝi.

Oni asertis ke en la filmo vi montris Esperanto-parolantojn en klare malkomfortaj situacioj antaŭ la kamerao, kaj tio donas la senton ke vi ridindigis ilin. Kiu estis via intenco?

Mi volas emfaze deklari ke ne estas intenco mia ridindigi iun ajn. Kiel mi menciis antaŭe, "La Universala Lingvo" estas ama portreto. Mi alproksimiĝis al Esperanto kiel admiranto, kaj tio ne signifas ke mi estas tute senkritika kaj ne havas proprajn sentojn rilate al esperantistoj kaj al la historio de la lingvo, sed mi ripetas - mi faris tiun ĉi filmon por krei ion, kio pozitive ŝanĝos la manieron en kiu la publiko ĝenerale pensas pri Esperanto.

Unu el la aferoj, kiuj impresis min pri la esperantistoj, kiujn mi ekkonis dum la Universalaj Kongresoj kaj en aliaj lokoj, estas ke multaj personoj en la Esperanto-mondo estas unikaj kaj nepre individuaj. Mi pensas ke foje esperantistoj estas sentemaj rilate al tio. Sed honeste, mi pensas ke tio estas unu el la grandaj reklam-punktoj por la lingvo. Esperantistoj estas ĝenerale tre interesaj uloj. Kompreneble ekzistas kelkaj frenezuloj kaj stranguloj, sed tio ne estas entute malbona afero. Oni povas,

personoj, kio rivelas erojn pri tio kio ili estas. Foje la vizaĝesprimoj kaj gestoj de la homoj en embarasaj momentoj diras multe pli ol vortoj kaj preskaŭ ĉiuj ne-esperantistoj, kiuj vidis la filmon, estis ravitaj de tiuj partoj. Do denove, mi neniel sentas ke la filmo malrespektas aŭ malestimas iun ajn.

Ĉu vi opinias ke la simileco montrata en la filmo inter socia planado, komunismo kaj Esperanto ankoraŭ validas en la nuntempo?

Ne, tute ne. En la filmo, Renato Corsetti kaj Arika Okrent argumentas nur ke unu el la plej gravaj pe-

"Esperanto ĝuas momenton en kiu estas ondo de intereso pri la lingvo kaj oni pririgardas ĝin serioze kaj respekte"

kaj miaopinie oni devus uzi tion kiel fierindan simbolon.

Mi pensas ke via demando rilatas al la portretoj de Esperanto-parolantoj kiam la kamerao estas tre proksima al iliaj vizaĝoj. Mi uzis tiun metodon por elvoki ion el la

riodoj por Esperanto - la 1920-aj kaj 1930-aj jaroj - kunokazis kun epoko en kiu homoj vere kredis je socia inĝenierado kaj grandaj sociaj projektoj. Tio estis dum la fruaj jaroj de socialismo, la ideoj de Le Corbusier, Henry Ford kaj amasproduktado, la Ligo de Nacioj. Esperanto tute



"Utopio" ricevis kritikojn de esperantistoj



“La Universala Lingvo” estas pozitiva portreto, sed ankaŭ kritika

taŭgis en tiu ondo kaj pensmaniero. Mi certe ne kredas ke tiel estas nun - homo ĝenerale ne plu kredas ke tia projekto povus sukcesi. Ni celas multe pli malalte nuntempe.

Kial “La Universala Lingvo” daŭras mallonge?

Kio laŭ vi, estas la plej granda baro kontraŭ Esperanto?

Do, tio estas iom peza demando. Honeste - kaj mi tre esperas ke mi ne ofendas iun dirante tion ĉi - mi kredas ke la Esperanto-movado malbone surmerkatis sin. Mi scias ke iom strangas uzi vorton kiel

“Esperanto-movado malbone merkatigas sin”

Mi forte kredas ke ĉiu filmo havas idealan longecon. Kiam mi redaktas, mi neniam ekpensas ke mi faros 60- aŭ 90-minutan filmon. Mi longe redaktis “La Universala Lingvo” kaj, surbaze de la materialo kiun mi havis, tiu ĉi longeco ŝajnis ĝusta al mi.

Kian akcepton ricevis “La Universala Lingvo”? Ĉu ĝi jam montriĝis ĉe filmfestivaloj?

La filmo ricevas tre bonan akcepton. Mi ekmontras ĝin ĉe filmfestivaloj nun. Ĝi partoprenos ĉe la havana film-festivalo venontamonate kaj ankaŭ poste en multaj aliaj. Mi krome montras ĝin ĉe usonaj universitatoj kaj mi vojaĝas kun tuta programo de mallongaj filmoj kiujn mi faris, inkluzive “La Universala Lingvo”. Tre plaĉas al mi montri ĝin ĉe Esperantaj okazaĵoj kaj oni bonvole kontaktu min pri tiaj okazoj.

“merkato” en la kunteksto de io, kio estas nobla kaj pura. Sed verdire, en la mondo hodiaŭ, se esperantistoj volas antaŭenigi la lingvon kaj allogi pli da parolantoj, oni devas pripensi tiel. Mi kredas ke la aferoj kiuj allogas ne-esperantistojn estas: la historio de la lingvo, la fakto ke ĝi estas profunde esperanta projekto (eĉ la nomo de la lingvo signifas “esperanto”), kaj ankaŭ la rave diversa esperantistaro hodiaŭ.

Ŝajnas al mi ke malgraŭ la neideala surmerkato, Esperanto ĝuas momenton en kiu estas ondo de intereso pri la lingvo kaj oni priregardas ĝin serioze kaj respektive (kaj ke mia filmo spegulas tiun fenomenon). Mi esperas ke mia filmo povas diskonigi Esperanton. Kiel mi diris, mi kredas ke ĝi estas pozitiva bildo. Kaj la fakto ke ne-esperantisto faris ĝin, montras ke ĝi ne estas propagandaĵo.

Pri kiuj projektoj vi nun okupiĝas?

Nun mi faras kelkajn mallongajn filmojn por malsamaj artaj muzeoj, alian dokumentan filmon pri la nebulo en San Francisco kaj trian projekton pri la desegnisto-viziulo Buckminster Fuller.

Kio estas via plej granda ambicio kiel dokumentisto?

Tio estas grandega demando! Mia ambicio kiel dokumenta filmisto estas nur komuniki sur profunde emocia nivelo ion pri la vivo en la hodiaŭa mondo. Mi estas fanatikulo pri arto, kiu kreas ligojn inter homoj. Mi pasie interesiĝas pri la mondo, kaj mi kredas tre profunde ke aferoj povas radikale malsamiĝi kaj pliboniĝi. Mi admiras kreemon, imagpovon kaj la homaron. Do mi esperas ke miaj filmoj helpas celebri kaj kuraĝigi ĉion ĉi.

Ĉu vi ŝatus ion aldoni?

Unu afero, kiun mi volas mencii, estas ke mi klopodis produkti DVD-on de La Universala Lingvo, kiun oni povus distribui kiel eble plej vaste. Mi konatiĝis kun Alexander Osincev kaj lia grupo Filmoj sen Limoj. Multaj bonegaj volontulaj tradukistoj helpis traduki la filmon en 20 lingvojn. Do, la DVD havas subtekstojn en la ĉina, korea, malta, franca, hispana, germana, bulgara, kaj multaj aliaj lingvoj [2].

Mi esperas ke tiu ĉi filmo havos signifon por esperantistoj, sed ankaŭ kredas ke “La Universala Lingvo” povas esti io, kion esperantistoj povas montri al siaj ne-esperantistaj amikoj kaj familioj, kaj post kiam tiuj vidos la filmon, ili estos pli malfermaj kaj interesataj pri la lingvo. ■

Tradukhelpis: Neil Blonstein kaj Steve Brewer.

Filmo pri la plej granda aĉetcentro en la mondo:

www.pbs.org/pov/utopia/

Por mendi DVD-n de “La Universala Lingvo”:

www.esperantofilm.com aŭ www.dokumentafilmo.com



Blogo de naĝisto

Kiel mi jam klarigis antaŭe, mi havas kelkajn memorproblemetojn.

Mi, du- aŭ tri-foje semajne, iras al la naĝejo. Mi tre ŝatas naĝi, kaj dum la naĝado estas tempo por "paroli" kun mi mem kaj kun mia propra korpo. Senti sensaciojn, aŭskulti ĝin, aŭ simple pensi pri kelkaj ne gravaj temoj. Sed la temo (mi ne volas perdi la fadenon) estas ke mi, fojfoje forgesas aferetojn. Do, la pasintan semajnon, ekzemple, mi forgesis la okulvitrojn. Kompreneble, estas permesite naĝi sen okulvitroj, sed krom la problemo de malbona vidpovo (pro la fakto - de mi ne bone komprenata - de la luma refrakto) estas la problemo de la troa klorado de la naĝeja akvo. Ni ĉiuj deziras, ke la akvo ne nur estu pura, sed, ke ankaŭ ĝi, cezaredzine, ŝajnu pura, do, se la zorganto dubas, li aŭ ŝi certe verŝas iomete pli da kloro. Mi ne plendas pri tio, nur klopodas kompreni, kial miaj okuloj estis tute ruĝaj post la naĝado.


Alian tagon mi forgesis la gumo-sandalojn. Unue, mi pensis, ke tio ne multe gravas, finfine oni naĝas senŝue, ĉu ne? Sed baldaŭ la respondeculino diris al mi, ke pro sankialoj, la gumo-sandaloj estas devigaj. Estas ŝimoj, kiuj atakas la naĝistajn piedojn (ŝajne ili vivas per la akvo sed nur for de la akvo!). Bone, mi ne devas kompreni la tutan mondon kaj ĝian grandegan komplikecon.

Trian tagon mi forgesis la banĉapon. Denove, la respondeculino admonis min kaj ŝi donis al mi, kiel recidivulo, broŝureton kun la normoj de la naĝejo.

La sekvan tagon, post legado de la normaro, mi reiris al la klubo, kaj zorge metis en mian dorso-sakon kaj la gumo-sandalojn kaj la banĉapon. Mi eĉ ne forgesis la okulvitrojn. "Tuto en ordo!", mi diris, kaj ekkomencis la naĝadon. Mi multe ĝuis ĝin, sed, kiam mi eliris, mi klare vidis, kion tiam mi forgesis: la bantukon. Kompreneble, ne estas leĝo, kiu malpermesas forgesi la bantukon, do la regularo, kiun mi pacience trastudis, nenion diris pri tio. Nu, mi ne estis deliktulo, sed ja malfeliĉa malsekulo. Per iomete da pacienco kaj strangaj pozoj, mi sukcesis sekigi min sub la elektra mansekigilo. Bone, afero senprobleme solvita.

Sed hieraŭ okazis alia forgesaĵo. La lasta. Antaŭ ol eliri hejmen, mi kontrolis, ĉu ĉio estas en la dorso-sako. Mi alvenis naĝejen, kaj komencis naĝadon. Baldaŭ, mi havis strangan sensacion, fakte, nekutimajn sensaciojn. La unua temis pri pli da libereco, mi sentis min tre komforta dum la naĝado. La dua sensacio estis soleco. Mi sentis, ke mi naĝas sole. Sed ne temis pri sento, estis realaĵo. La kunnaĝintoj estis for el la akvo, ili formis grupon kaj severe rigardadis al mi. Baldaŭ alvenis la respondeculino, kiu devigis min foriri el la akvo kaj kovri min per la bantuko. Mi, momente, ne komprenis, kial ŝi emfazis tiujn vortojn "bonvolu kovri vin per la bantuko".

Oni ne permesas min reiri tien. La mondo estas plenplena je maltoleremaj homoj. ■



Interreto

Libereco aŭ dependeco

ROGENER PAVINSKI (BRAZILIO)

La unua fojo kiam mi aŭdis pri Interreto, estis en la mezo de la 90-aj jaroj en revuo, en kiu oni asertis ke pere de tiu tutnova kaj revolucia teknologio, per la ekrano de komputilo, mi baldaŭ povos viziti muzeojn tra la mondo sen eliri el mia hejmo. Tiam mi estis 15-jara kaj komputilojn nur vidis funkciajn per la malnova operacia sistemo MS-DOS. Komprenble mi taksis la artikolon ekstreme fantazia. En la kapo, mi imagis tiujn virtualajn vizitojn al muzeoj preskaŭ egalaj kiel nuntempe eblas per "Google Arta Projekto"[1], la sistemo de Google, kiu faras diversajn fotojn kaj permesas al ni promeni virtuale ene de 17 el la plej gravaj muzeoj tra la mondo kaj rigardi pli ol mil artaĵojn.

Estas vere imprese kiel io, kio aspektis tute fikcia antaŭ 20, 15 jaroj, fariĝis nun realo. La monda komputila reto, kiu ĝis la komenco de la 90-aj jaroj servis preskaŭ nur por interŝanĝi informojn inter universitatoj, post kelkaj jaroj estis pli kaj pli alirebla de la ordinara publiko – dum tiu jardeko ĝi kreskis je pli ol 100% jare. Nuntempe en la mondo, 2 miliardoj da homoj havas aliron

al ĝi – 30% el la monda popolo [2]. Eŭropo enhavas preskaŭ 480 milionojn da uzantoj, pli ol duonon el ĝia popolo. Tiu nombro reduktiĝas al malpli ol 6% en Afriko, kio montras ke tia demokratia komunikrimedo klare ne estis ankoraŭ sufiĉe demokratiigita.

Se paroli pri demokratio, Interreto tamen provokis agadojn en tiu kampo. Ĝi grave rolis ekz. en la t.n. Araba Printempo – revolucia ondo, kiu ekde 2010 ĝis nun daŭre atingas Mezorionton kaj la nordan Afrikon. Revoluciemuloj uzas la Interreton por organiziĝi kaj samtempe informi la popolon kaj la internacian komunumon fronte al la klopodoj far la registaroj subpremi la protestojn kaj la informfluon tra la tradiciaj kanaloj. Fakte en kelkaj landoj, kiel Irano, Norda Koreio, Ĉinio kaj Kubo la aliro al tio, kion la popolo povas vidi en Interreto, estas kontrolata ĉefe pri politika kaj religia enhavo.

Kvankam la politika uzo de la Interreto estas sufiĉe frua fenomeno, ĝia eduka kaj socia valoro estas jam de pli longe rekonata. La facila aliro al diverskultura enhavo povas disvolvi edukadon kaj socian

vivon, sed samtempe plifortigas la tutmondiĝon, pliintensigante la interŝanĝon de valoroj kaj kutimoj inter malsimilaj kulturoj. Eble ni ĉiuj, eĉ senatente, ŝanĝis iomete nian pensmanieron pro tia intensa interŝanĝo, malgraŭ ke granda parto de Interretaj uzantoj kredas ke ili tute sendanĝere uzas ĝin.

Se antaŭe ni uzis ĝin nur por kontroli retmesaĝojn, la veteron aŭ plani la feriojn, pli kaj pli kreskas la allogaĵoj, kiuj igas restigi nin longajn horojn en la reto. Sociaj retejoj svarmas kaj tentas la uzantojn al konstanta rigardo de la novaĵoj kaj ankaŭ per virtualaj ludoj. La plej fama, "Facebook", havas 750 milionojn da uzantoj. Se la Interreto virtuale forigas izolecon, ĝi povas ankaŭ forigi la emon fari ion alian ol uzi la reton. Laŭ la Komputilo-Mania Studcentro ĉe la Hospitalo de la universitato Harvard en Usono, inter 5% kaj 10% de la Interretaj uzantoj suferas iun tipon de ret-dependeco. Malgraŭ ke virtuale viziti muzeojn kaj babili kun amikoj estas alloga, fari tion fizike ankoraŭ sendube restas multe pli bona sperto. Pensu pri tio venontfoje kiam vi startigos vian komputilon! ■

[1] GOOGLE ART PROJECT - WWW.GOOGLEARTPROJECT.COM

[2] LAŬ "INTERNET WORLD STATS" - WWW.INTERNETWORLDSTATS.COM



Memkritike pri la cifereca REVOLUCIO

LEONARDO JANZ – BRAZILIO



Dum la mondo tie, ekstere, disolvigās pere de nia kunlaborado ene de la nekuraĉebla neŭrozo de la konsumisma ¹disolvegismo, ni, ĉi tie, privilegiaj meznivelklasaj “monstretoj”, daŭre restadas ĉe farado de la nura afero, kiun ni scias fari (senutile), por ke estu ia reala transformiĝo en la mondo: ni fanfaronas.

Surfante de novaĵoj al novaĵoj, ĝuante nian tre nekredeblan virtualan liberecon (ĉu ne paradokso absurda?) kaj estante per ili mem limigataj/fabrikataj, tiam ni pensas, ni, fremdiĝintoj de la cifereca kulturo ke, ju pli da musklakoj sur tion kaj alion, des pli gravan agon ni faras por la konstruado de la “nova mondo”.

Verŝajne, ni ne sukcesas rimarki la dimension de tiu stulteco. Estas tre komforte, kaj eĉ konsole, ĉar, se unuflanke ni ĉiam faras ĉiutage absolute la samajn aferojn (en la idiota ĉiutageco, kiu nin ĉiujn

mortigas), aliflanke, ni simulas havi ian agadon efektivan, pere de la reto, kvazaŭ por kompensi al ni la pekojn per savantaj kvotoj de enkalkulitaj bitoj.

Mi, ĉi tie, jam konfesas mian stultecon en la tuta skemo. Ni ĉiuj estas sufiĉe naivaj, se ne ja hipokritaj, kredigante al ni mem, ke tiu “fekaĵo” iel realigas konsiderindan diferencon. Kvazaŭ prinubitaj konscioj, tio do aspektas kiel lasta rimedo, kiu taŭgas al ni, fronte al tiu pli ol malgastama monda scenejo, kiun ni kune estigas kaj dissemadas pere de la mizera kulturo “okcidenta”.

“Ho... Sed tiel vi bildigas ĉion tro pesimisme”, dirus la plimulto, la defendantoj de la ²senŝanĝismo. Tamen, mi diras ke tio estas tenebra. Niaj vivoj restadas en nepritaksebla malnobleco, tiamaniere kontribuante al la plej granda katastrofo, kiun eĉ la plej genia cerbo ĉi-planeda neniam ajn antaŭvidis... Ĉu vi ankoraŭ dubas, ke ni vivas en la fino de la tempoj por tiu ĉi nia “kara” homa raso?

Ni ne scias fari alian aferon,

ol rotacii en la ĥaoso, samkiel faras tiuj niaj povraj laboratori-musetoj. La sama scienco, kiu portis al ni mirindajn antaŭenirojn teknikajn, estas tiu, kiu nin mortigas en rapido neniam ajn imagita. La nenomebla nigra truo, komence malkovrita tie, “ekstere”, distance en la spaco, kaj poste, rekreita en la grandiozaj laboratorioj tra la mondo, nun estas transprenita en nia tutmonda kunteksto soci-kultura.

Vi ne dubu, ke la multo, kiun ni estigadas en tiu ĉi histori-periodo, estas, precize, vortico psiko-socia kun enorma granda, pro kies konstruo certe envas nin eĉ ekstertoranoj en aliaj “anguloj” de tiu ĉi nemezurebla ³multuniverso. “Kiel ili sukcesis alveni ĝis tia punkto, kaj, ankoraŭ, senprudente, konsideras ĉion laŭ perspektivo de progreso?” “Tiuj kreitaĵoj, homestuloj, estas vere estaĵoj tre fabelaj kaj nedeĉifreblaj”.■

1.“disolvegismo”: termino de ekologia ekonomiko, kritikema pri la nuna reganta politiko utilisma, kaj defendanta pli da emfazo sur plibonigon de viv-kvalito.

2.“senŝanĝismo”: kvazaŭ “filozofio” de tiuj homoj, kiuj ĉiam agas same, kaj emas teni la ĝisnunan staton de la aferoj tia, kia ĝi estas.

3.“multuniverso”: aludo al unu el la plej fusaj hipotezoj de fiziko, laŭ kiu ekzistas ne nur unu universo, sed multaj el ili, interkonectitaj pere de la “umbiliko” de multaj pra-eksplodoj.

Blogo de la aŭtoro
<http://vivogaia.blogspot.com>



Nunaj revoluciiloj

"Civilizita Interreto"

Ĉu detruante la liberecon de la Reto?

SERGEO TYIRIN - ISRAELO

La gvidantoj de Usono, Britio kaj Francio aŭdigas pli kaj pli klarajn eldirojn pri formulado de novaj reguloj, kiuj laŭimplike celos sekurigi la Reton (vd. 'sekura krosado por infanoj') kaj kontraŭbatali la rompadon de kopirajtoj; sed kion vere ili volas laŭpraktike?



En novembro okazos en Londono konferenco, organizata de la Brita registaro, kies celo estos nemalpli ol "diskuti normojn de akceptebla konduto en la cibera spaco" kaj "kunigi ŝtatojn por esplori taŭgajn mekanismojn por doni al tiuj normoj realan povon." Kaj la usona kaj la brita gvidantoj sonas absolute seriozaj rilate al la reguligo de la Interreta spaco, dum la franca prezidento, kiu iniciatis la 'e-G8' (kunvenon de reprezentantoj el registaroj kaj grandaj teknologiaj kompanioj surreto-bazitaj, tuj antaŭ la G8-kunveno), klare anoncis ke tia leĝo kaj kontrolado survojas al la virtuala mondo.

La rezolucio de G8 rilate Interreton tekstis jene: la Reto ne estas aparta ago-sfero sed kroma parto de la normala mondo de leĝoj kaj reguloj; tial ĝi devas esti "inkluzivita en la pli vastan kadron de respekto al leĝoj, homaj rajtoj kaj bazaj liberecoj, kaj de protekto de rajtoj je intelekta propraĵo kiu promocias la vivon en ĉiu demokratia socio profite por ĉiuj civitanoj. Kaj la kadro kaj la princi-

poj devas havi la saman protekton en la Interreta medio, samkiel ĉie aliloke." Por ke tio okazu, "la agado de ĉiuj registaroj estas necesa per la naciaj regularoj, kaj ankaŭ per internacia kunlaboro," – precipe rilate al la intelekta propraĵo.

Kion tio signifas? Certe la nuna stato de la Interreto – preskaŭ en la stilo de Thomas Hobbes [tomes hobs][legu la apartan kadron] – bezonas iom pli da sekurigaj reguloj. Tamen, ĉu la registaroj kaj la grandaj korporacioj kiuj manipulas ilin (per lobiado aŭ aliaj manieroj), povos vortumi regulojn, kiuj ne aspektos inspektome kaj cenzure je la kosto de parol-libero? Usono, Britio kaj Francio havas certan vidpunkton rilate tion kiel devas aspekti tiuj necesaj leĝoj – ekzemple, ke iu povas esti malkonektita de la Interreto post 3 kontraŭleĝaj mp3-elŝutoj – sed evidente ilin ne same imagas aliaj ŝtatoj, kiel Nederlando – kiu ĵus akceptis leĝon pri neŭtraleco de la

Reto, aŭ Rusio – kie entute mankas intereso pri reguligo de la cibera spaco.

La solvo de la tri menciitaj aliroj al la problemo estas kreo de 'virtualaj landlimoj', kiuj apartigos la civitanojn de tiuj ĉi ŝtatoj disde la 'kaoso' de la Reto en aliaj ŝtatoj. Per simplaj vortoj: Blokada de aliro al retejoj troviĝantaj ekster la leĝa sfero de Usono, Britio aŭ Francio.

Surbaze de batalo kontraŭ stuprado, seksperforto, hazardludado aŭ rompo de kopirajtoj, la Usona Kongreso diskutas manierojn starigi tiajn 'virtualajn barilojn', dum en Eŭropo estas konsiderata unuecigita 'Granda Fajromuro' ĉirkaŭ la Ŝengena zono[1]. Tiuj ĉi paŝoj al "civilizita" Interreto efektive permesos filtri la pli- kaj pli-longiĝantan liston de enhavo, al kiu la registaroj ŝatos limigi la alireblon. Vi jam povas ekkapti en kiun realon tio gvidas...

La afero, tamen, estas ke la Reto prezentas realan riskon al la konstituantaj establoj – kaj registaraj kaj ekonomiaj. Ĝi estas la fekunda grundo sur kiu novaj, foje radikalaj, ideoj povas kreski; homoj kun apartiĝanta vidpunkto povas trovi unu la alian; ĉiu povas esti aŭdata; kie mono grandskale ne ludas rolon. Tio estas nova mondo, kiu estas ekstere la regado de la establataj regantaj instancoj.

La 'malnovstilaj' medioj estas reguligitaj kaj efike kontrolataj, ankaŭ en have. Kreante novan televidan kanalon aŭ gazeton oni devas sufiĉe pagi kaj subiĝi al registara cenzuro. Antaŭ la ekesto de la Interreto, homoj havis sufiĉe limigitajn eblojn organiziĝi kaj prezenti riskon al la establataj instancoj. La Reto ŝanĝis tion; ene de kelkaj minutoj kaj kun minimuma mon-investo vi povas havi vian



Por forlasi "Twitter"-n uzu
<http://goo.gl/8UVCU>

Diru adiaŭ al viaj retaj profiloj

Ĉu vi laciĝis je stultaj retaj ludoj, malgravaj informoj kaj ekspozicio tra la sociaj retoj? Se post la legado de la nuna eldono pri Interreto, vi emas entute forlasi sociajn retejojn kiel Facebook kaj Twitter, ni donas etan

helpon. Sed, antaŭ ol uzi la ligilojn sube, atentu: Tiu ĉi estos senrevena decido. Vi eĉ povas malfermi novajn kontojn poste, sed via nuna konto estos fermita kaj ĉiuj datumoj kaj konektoj forviŝitaj.



Por forviŝi "Facebook"-n iru al
<http://goo.gl/0xxu4>

voĉon aŭdata (kaj mal/subtenata). Ĝi estas danĝera ankaŭ pro la fakto ke ĝi efektive tenas neniujn sekretojn kaj toleras neniujn sekretojn; registaroj tra la mondo baziĝas tro ofte sur kaŝado de informoj, kaj Interreto – kies plej fama ekzemplo estas WikiLeaks – endanĝerigas la akceptitan labormanieron.

Kial la registaroj en la demokratiaj landoj timu la sovaĝan terenon de la Reto? Ni analizu la ekzemplojn de Barack Obama en Usono kaj Geert Wilders en Nederlando. Ambaŭ gajnis popularecon grandparte danke al la Interreto, eĉ se venantaj el la establita "malnov-mondaj" cirkloj. Tamen, se ili sukcesis, kio baras alian, tute nekonatan kaj ne-asociigitan kun ajna establita instanco, ripeti ilian sukceson? Tion evidente ne ŝatus la ekzistantaj partioj, kie la konkuro al povo ludas la plej gravan celon, eĉ se kaŝata per belaj sloganoj.

La adeptoj de mondkoncepto laŭ kiu registaroj estu komplete diafanaj, certe jubilas pro la nuna stato de la Reto, kiu redonas la povon reen al la popolo – kaj ĉi-fenomeno nur akceliĝas (vidu la ekzemplon de la Araba Printempo). Tiel daŭrigante, la registaroj ne havas alian eblon ol esti 100%-e travideblaj, kaj tion ili evidente volas eviti. Indas rimarkigi aldone, ke kvankam grandskale tio estas ĝusta direkto ĉar ekzistas temoj – ekzemple, rekte tuŝantaj la sekurecon de la civitanoj – kiujn oni prefere ne publikigu, kaj tio plej veras por landoj ne troviĝantaj inter amikaj najbaroj.

Sed sufiĉas pri politiko. Ĝi ne estas

la sola kiu spertas radikalajn ŝanĝojn pro la Interreto: tiu ĉi medio instigas neimageblan amasegon de kreemo, ofertante al iu ajn esprimi sin. Ĉu temas pri amatoraj filmetoj, aŭ pri elstara aŭtoro mem publikiganta sian debutan libron – la Reto alportas morton al la tradicia modelo de enhavo. Artistoj ne plu dependas de grandaj entreprenoj kiuj popularigu ilian kreaĵon, kaj la enhav-industrio kiu daŭre kontraŭas modernigi laŭ la novaj konceptoj, plu perdas sian povon, kio tradukiĝas al perdo de enspezoj.

Ankaŭ la maniero aĉetumi grave ŝanĝiĝas; konsumantoj nun havas la eblon ne nur kompari produktojn kaj kostojn en la vendejoj en sia ĉirkaŭaĵo, sed en pluraj vendejoj tra la lando kaj eĉ el la tuta mondo. La tutmondiĝo de la merkato certe havas tre pozitivan efikon sur konkurenco. Kaj ankaŭ ĉi-rilate ripetiĝas la samo: la balanco de povo transiĝas el la manoj de establitaj entreprenoj al la "simpla homo", kaj firmaoj ne plu povas miskonduti dumlonge; la Reto ne toleras sekretojn...


Evidentaj do estas la kialoj kiuj gvidas politikistojn kaj grandajn entreprenojn limigi la liberon kreatan de la Interreto. Striktigo kaj cenzuro de Interreto laŭ kaprico de tiu aŭ alia lobianto forprenos la liberon, je kiu ni rajtas kiel homoj, kiel civitanoj, kiel konsumantoj.

Kompreneble, la trolibero kreas spacon ankaŭ por damaĝaj, kontraŭleĝaj, danĝeraj agoj – kaj kontraŭ la efektivegbleco de tiuj oni devas protekti. Evidente, necesas

fini la Sovaĝa okcidentan[2] etoson; sed tio devas esti farita saĝe kaj kun daŭre flegata respekto al la bazaj liberecoj (ja garantiataj en la "reala" mondo) kaj al la kaosema naturo de ĉi-medio ofte instiganta al fruktodona kreemo. Nek disvastigo de sensencaj timigoj nek demagogio helpas la procedon. ■

Fontoj: Ars technica kaj OSNews

Thomas Hobbes



Thomas Hobbes [tomes hobs] (1588 – 1679) estis angla filozofo, la unua ĉefa filozofo de modernismo kaj plej konata pro siaj politikaj filozofiaj rezonoj. Li disvolvis la fundamentojn de la eŭropa liberala penso, kaj en sia majstroverko "Leviatan" ellaboris la ideon de homa socia kunlaboro pro propraj intereso, nome: ĉiu homo vivas nure por si mem, ne estante nature homama. Sekve politika potenco devenas ne de Dio, sed de la popolo; la baza ideo estas tiu de socia kontrakto, interkonsento de civitanoj – ĉu implica ĉu malimplica – pri tio, kiu regas kaj kiel.

El vikipedio
Permesilo CC BY-SA 3.0

Rimarkoj

[1] Traktato de Schengen [ŝengen] estas interkonsento kiu forigas ŝtatliman kontrolon de personoj, kiuj traveturas trans ŝtatlimojn inter la traktato-ŝtatoj.

[2] Etoso en kiu ĉiu estas reganto de si mem kaj ĉiu difinas memstare la leĝojn kiuj aplikigas al li.

Kio okazos kun via "Interreta vivo" kiam vi mortos?

ANA RIBEIRO - BRAZILIO

Oni havas multajn paĝojn en Interreto: Facebook, Twitter, retadreso ktp. Kio okazos al ili post via morto? Ĉu niaj gefiloj devos heredi la profilojn en Interreto kiel ili heredas hejmon, ekzemple? Ankoraŭ ne ekzistas leĝoj pri tio, sed estas neeviteble ke en granda retpaĝo kiel Facebook, kiu havas ĉirkaŭ 500 000 000 profilojn, ĉiutage almenaŭ unu uzanto mortas. Tiel la grandaj interkonaj retejoj kaj poŝtservoj jam havas regulojn pri tio.

Facebook

Facebook havas specialan konton por tiuj, kiuj mortis. Ĝi nomiĝas Memorejo (Memorializing Accounts, angle). Kiam iu profilo iĝas 'memorialo' neniu povas aliri ĝin, kaj neniu povas proponi Amikiĝpetojn kaj la mortulo ne estos plu inter "Homoj, kiujn vi eble konas". Se la familio volas, ĝi ankaŭ povas malaktivigi la konton. Oni povas fari tion al la Facebook-konto pli facile ol al Google-konto, vi ne devas necese esti parenco de la mortinto, vi povas esti nur ties amiko.

Google/Gmail

En Google se vi volas vidi la retdreson de iu via morta parenco aŭ aliri al ties interkona retejo Google +, vi devas sendi al Google en Usono multajn

dokumentojn por pruvi ke via parenco mortis kaj pruvi ke vi estas parenco de tiu, kiu mortis, vi oficiale tradukigas per aliaj personoj anglan kelkajn dokumentojn. Sed se vi volas regi la Gmail-konton de tiu parenco, vi devas sendi la peton al Google de 9 monatoj antaŭe, ĉar Gmail-konto aŭtomate malaktivigas post tiu periodo.

MySpace

La iam famega, sed nun forgesita interkona retejo MySpace ankoraŭ ne havas specialan politikon por mortuloj, malkiel Facebook, sed la regularo de MySpace asertas ke ili ne malaktivigas vian konton se vi ne uzas, kaj se via familon volas, ili povas malaktivigi vian konton. Sed estas ankaŭ malfacile informi ke oni mortis.

Twitter

Vi povas peti al Twitero ke ili resendu al vi ĉion kion via parenco skribis, kaj vi povas peti ke ili malaktivigu la konton, sed ankaŭ estas granda burokratiaĵo.

Microsoft/Hotmail

Se vi ne uzas ĝin dum 90 tagoj, Microsoft aŭtomate malaktivigas vian konton. Sed vi povas peti al Hotmail ĝis antaŭ 270 tagoj ĉion, kion vi verkis. Okazas ankaŭ tio ke, se vi mortas, via familio povas peti la tuton, kiun vi verkis ĝis 360 tagojn antaŭ via morto, sed ĉu vi vivas aŭ ne, estas malfacile akiri tion el Microsoft, ĉar vi devas sendi al ĝi multajn dokumentojn.

Konklude

La maniero rigardi la "interretan morton" dependas de la kulturo kaj teknikaj aferoj, ĉu la serviloj de la retservoj ĉiam havos sufiĉe da memoro por ĉiuj profiloj? Ankoraŭ, la interreta vivo post la morto estas tre malklara afero, mi pensas ke devus ekzisti regulo por interkonaj retejoj kaj retadreso, kiu respektas la kulturon de la uzanto. ■

KRUCENIGMO

★	LA UNUA KAŜITA PROVERBO	SIMBOLO DE AMPERO	PLENA VORTARO	★	FARAS IONIA	MAL-JUNUL' AĜUL'	LA DUA KAŜITA PROVERBO
SUPRA KORPO-PART'				MAL-MULTE FEMAL'			
ADVERBA FINAJO		FREŜA, RAPIDEGA NEGIS					
AVIADILA SIMBOLO DE NORVEGIO			METALA MONTRIL' PURA, DEFINITIVA				
REZINO-RIĈA LIGN'				PREPOZICIO NATŬRA BASENO			
TIA-MANIERE					NOMO DE LA 16-A LITERO MARGUSTA		
EKZISTAS						AKUZATIVA FINAJO TREMJ PRO DANGERO	
ROMANE 1000		VIRINA NOMO MEZURUNU (brulligno)					
POST-SKRIBO			OLEORICA FRUKT' KORTA BIRD'				
SUFIKSO DE PASIVA PREZENCIA PARTICIPO				KOR-INKLINI KOVRAS PER ORO			
LIGILO EL KUN-IGITAJ RINGOJ					SIMB. DE IRIDIO MAL-JUNAS		
MAL-KOREKTA						INFINITIVA FINAJO SUISTA KUDRILEG'	
SIMBOLO DE SULFURO		MAL-STULTAN SKOTA VIRAJUP'					
NUMERALO			NATRIA KLORIDO POSEDATA DE TIU				
METALA KUN-IGIU'				KONJUNKCIO VICMONTRA NUMERALO			
ELEKTITAR'					VI KAJ MI MONTO KUN PASTEJOJ		
ĈIELE MALPEZA						ADJEKTIVA FINAJO LA GASOJ ĈIRKAŬ NI	
SIMBOLO DE SIMENSO		GRUP' DA LITEROJ FARITA DE HOMO					
SIMBOLO DE TANTALO			VICIG POR KONTROLO AMUZ-KUNVENO				
GRANDA LIGNECA PLANT'				VALORA METALO VULKANA ELFLUAJO			
LOĜEJ' POR BRUTOJ					SUFIKSO (FRAKCIO) SENAKVA, MALHUMIDA		
RAPIDE MOVIGAS MAL-SUPREN						AUTOSIMB. DE SVEDIO KUBANA DANC'	
SUB-STANTIVA FINAJO		DEDIĈU, DONACU AFABLA DEZIRAD'					
PRENU (SUR RECEPTO)			INTERES, PROFESI' VIRA VESTO				
GERMANA E-JUNUL-LARO				KUN KOR-INKLINO JUNULARA SEKCIO			
TUTE MAL-GRANDAJ					ONOMATOPEO (tremo) SUFIKSO (TUMORO)		
GERMANO APUD ELBO						LA SESA TONO ROMANE UN U	
LIRIKA POEMO				PREFIKSO (malgusta faro)			

Krucenigmo el la libro "107 Krucenigmoj en Esperanto" de Stano Marĉek. Republiĝo laŭ permeso de la aŭtoro.

Ĉu ni jam perdis la infanecon?

FACILA

En la nunaj tempoj infanecaj trajtoj estas tiom necesaj kiel en pasintaj tempoj. Inter tiuj kiuj ĵus alvenis al la mondo, verŝajne okazas ke tiuj et-uloj tro rapide evoluas kaj forgesas fari infanajn aferojn. Kun la novaj kaj mir-indaj teknologioj aperas novaj generacioj, kiuj kompreneble ne devas same aspekti, agi aŭ pensi kiel la antaŭaj, sed certe ankaŭ ne devas perdi la ĉefajn vid-punktojn rilate al la vivo dum tiuj unuaj vivjaroj.

La perforto inter infanoj estas unu el la problemoj. Fakte ĝi ĉefe radikas en tio, kion ili denaske ekvidas hejme inter siaj gepatroj kaj gefamilianoj kaj poste, sur tiu bazo, kion ili mem faras. Aliflanke ludoj, kiel kapti homojn, enkarcerigi aŭ murdi, ankaŭ ne helpas, eĉ por iliaj animoj kaj la estonta kreado de personeco. Ili ne devus iri dormi malfrue, aŭ aŭskulti plenkreskulan muzikon, kiu parolas ĉefe pri temoj, kiujn ili ne konas kaj ne povas kompreni.

En la aktualaj jaroj la plej-multo ne interes-iĝas pri infana muziko aŭ rakontoj, kiuj parolas pri instruado, pri la belecoj de steloj, pri amuzaj pupetoj, kiuj dancas, aŭ pri bonkoraj sentoj al famili-anoj kaj amikoj. Tiuj estas la plej interesaj kaj gravaj temoj por tiuj etuloj, kiuj komencas koni la mondon kaj kiuj ankoraŭ ne povas difini bonon kaj malbonon.

Infanoj bezonas esti feliĉaj, respektmaj, agemaj kaj havi pacon en sia malgranda mondo, kiu komencas malferm-iĝi antaŭ iliaj okuloj. Ili kompreneble devas evolui, sed paŝo post paŝo, kun pacieneco, kompren-emo, dediĉ-emo kaj amo.

*vid-punkto: Mensa pozicio el kiu oni rigardas aferon

*aktuala: Nuntempa

*dediĉi: Plene destini por, tute fordoni al, plene oferi por

*terminoj laŭ ReVo [www.reta-vortaro.de]

KONTAKTO

KO-DISK

ROGENER PAVINSKI



★ ★ ★

Duonvoçe... tutkore

Manŭel

Populara

10 titoloj – Memproduktita 2011

Manŭel (Rovere Emanuele) estas italo, emerita elektroteknika inĝeniero, kiu en la junaĝo partoprenis en muzikgrupoj kaj eĉ verkis kantojn en sia gepatra lingvo, la friula – el la nordoriento de Italio. Li memlernis muzikon kaj agadis en la Esperanto-movado, ĝis laboro kaj operacio de voĉkordoj devigis lin forlasi Esperanton kaj muzikon.

Pasintjare li decidis reveni al Esperanto kaj muziko, kaj la rezulto estas tiu ĉi bele produktita albumo. Konsistanta el konataj kantoj de li mem esperantigitaj el la itala kaj la angla, la albumo – kvankam iom kliŝa – estas agrabla. Li mem asertas ke li estas amatora muzikisto kaj ke lia voĉo nuntempe estas nur pala ombro de tiu, kiu iam estis. Se tio ne vere rimarkindas – nur fojfoje ĝi estas mallaŭta rilate al la fono – la kvalito de la albumo preskaŭ samniveleas kaj eĉ superas kelkajn “profesiajn” ko-diskojn, malgraŭ la tre simpla libreta enpaĝigo..

La aranĝoj estas popularaj kaj tradiciaj, en perfekta “malmojosa” stilo, sed bone plenumitaj kaj registritaj. Se vi ŝatas trankvilan kaj ordinaran muzikon la disko plaĉos al vi. Rimarkindas ke la profitoj de la vendoj de la albumo estas donacitaj al la senprofitcela organizo “Evidente”, kiu zorgas blindulojn kaj interalie provizas lernejojn por malriĉaj kaj blindaj infanoj.



★ ★ ★ ★

Hiphopa Kompilo Vol. 2

Diversaj artistoj

Hiphopo

17 titoloj – Vinilkosmo 2011

Se en nia antaŭa numero (2011:3) ni asertis ke ko-diskoj pensiigis, tiu ĉi albumo estas la plej bona pruvo ke ili daŭre vivas kaj gravas. Tiu ĉi estas nepra disko por ĉiu esperantisto kaj se vi ne povas ŝati ĝin, konsci ke vi apartenas al pasinteco. Mi eĉ kuraĝas diri ke ĝi estas unu el la plej gravaj albumoj de la lasta jardeko, ĉar ĝi signas la futuron kaj bele pruvus ke Esperanto estas vivanta nuntempa lingvo – oni parolas pri amo per ĝi, sed ankaŭ oni sakras!

La dua volumo de tiu Hiphopa Kompilo, samkiel la unua, lanĉita en 2009, alportas al ni diverstalentajn artistojn kaj kvankam ĝi estas pure hiphopa, ĝi estas plene ĝuebla eĉ por tiuj, kiuj ne kutimas aŭskulti tiun muzikstilon. Kun pli da kontribuoj partoprenas la pioniroj en tiu muzikstilo en Esperanto: Eterne Rima, Platano kaj Pieĉjo, kiuj kune kun Tone malfermas la albumon per “Nia Hiphop”. Elstaras ankaŭ “Tritaga afero” de Dolchamar kaj impresas la buŝritmoj de Bugge Bang, kiuj servas kiel interludoj. Ne ĉiuj kontribuajtoj tamen estas egale bonaj, sed la averaĝa rezulto tamen elstaras, precipe pro la rimarkebla talento de Eterne Rima, kiu grandparte respondecas pri la kvalito de la albumo.

La arta laboro estas neriproĉebla. Libreto entenas la tekstojn, nepraĵn por akompani la rapidajn rimojn kaj ritmojn kiel neniam vi antaŭe vidis. Ĝi valoras ĉiun cendon.



★ ★ ★ ★

Revado

Rêverie

Folk-Progresiva

20 titoloj – DownBridge/Vinilkosmo 2011

Jen albumo kiu meritas atenton. Unue ĉar temas pri muzikgrupo, kiu faras specon de muziko, kiu trovas similecon en neniu alia grupo en Esperantio. Fakte eble nur Kaj Tiel Plu povas iom simili al la folkloro trajto de Rêverie, sed la Itala muzikgrupo aldonas al la folkloro ankaŭ progresivajn elementojn. La dua atentinda afero estas ke ĉi albumo estas duobla. En ĝi estas 2 Ko-diskoj – unu enhavas 10 titolojn kantitajn en

Esperanto, kaj la alia la samajn titolojn en la itala lingvo.

La inspiro de Rêverie, kreita en 1996, venas el la muzik-tradicioj renesenca kaj baroka, sed la miksiĝo de tradiciaj kaj modernaj sonoraj rezultigas propran stilon. Abundas flutoj, perkutitoj, sed ankaŭ elektra gitaro kaj elektronikaj efektoj. Kelkaj kantoj estas tre trankvilaj kun etoso de nova erao, aliaj estas pli intensaj kun pli da perkuto kaj malkons-tanta ritmeco. Malgraŭ la bonkvalita kaj profesia registrado, ŝajnas al mi ke en tiaspeca progresiva muziko mankas pli allogaj refrenoj. Aŭskulteblas ke ĉiuj muzikistoj estas tre talentaj, tamen la ĉiam akuta voĉo de la kantistino Fanny Fortunati fojfoje lacigas la orelojn, ĉar ĝi iom laŭtas kompare kun la fono.

La libreto estas belega kaj entenas la kanzontekstojn en Esperanto, itala kaj en la angla. Sendube bonega reklamo por Esperanto.



★ ★ ★

Brassens Plu

Jacques Yvart

Kanzono

13 titoloj – Vinilkosmo 2011

Jen la franca bardo Jacques Yvart lanĉas sian 29an albumon, la 3an en Esperanto. Samkiel en sia unua albumo aperinta en 1998, li denove omaĝas al Georges Brassens, fama franca komponisto kaj kantisto, kiu vendis pli ol 20 milionojn da albumoj inter 1953 kaj 1981.

El la 13 titoloj de “Brassens Plu” ses jam aperis en “Jacques Ivart kantas Georges Brassens” kaj estis rerregistritaj por tiu nova albumo, dum sep temas pri novaj kanzonoj. Mi ne komprenas la kialon pro kiu li reregistris la ses jam aperintajn kantojn ĉar ne estis ia ŝanĝo en la muzikaj aranĝoj, krom ke miaopinie ĉi tiuj registraĵoj estas pli bonaj.

La stilo samas – basa voĉo de Jacques regas kaj estras la simplajn aranĝojn. Akustika gitaro kaj baso, piano kaj akordiono estas la nuraj instrumentoj. Foje sentiĝas ke la tuto estis registrado de iu intima viva prezento, pro manko de postaj prilaboroj – espereble tiu rezulto estis ĝuste la celita. Malgraŭ la malbela kovrilo, la libreto estas bone aranĝita kaj entenas belajn kunajn fotojn de Yvart kaj Brassens. La KD entenas la instrumentajn titolojn laŭ mp3-formato kaj ankaŭ muzikvideon filmitan dum la registrado de la voĉoj.

The Universal Language

Dokumentfilmo

Angla kun subtekstoj

(eo, en, es, fr, cs, de, it, nl, pt, sv, ko, da, el, bl, fi, hu, sh, bg)

Sam Green

DVD - 2011

28:30min

La unuan fojon, kiam mi spektis "Universal Language", la plej nova filmo de la usona ĵurnalisto kaj dokumentfilmisto Sam Green en la unua kinofestivalo en San-Paulo, mi havis bonan impreson, sed ne tuj povis ŝati la filmon. Kelkaj aferoj ĝenetis min. Eble estis la verda etoso dum la Tutamerika Kongreso de Esperanto aŭ eble mi estis tro singarda pro lia antaŭa projekto "Utopia in 4 moviments" [Utopio en 4 movimentoj], kiu ne vere plaĉis ne nur al mi, sed al multaj aliaj esperantistoj. Mi tamen trankvile re-spektis ĝin hejme la duan kaj trian fojojn kaj alian impreson mi havis... sed, ĉu pli bonan?

Green estas juna sed jam sperta filmisto. Ricevinte financon subtenon i.a. de E-organizaĵoj (ESF, ELNA), li vojaĝis al kelkaj UK-oj kie li kolektis plejmulton de la materialo por "The Universal Language". Kvankam granda parto

de tiu materialo estis ankaŭ uzata por la vivaj prezentoj de "Utopia" (legu la intervjuojn ĉi-eldone por pliaj detaloj), ambaŭ filmoj/projektoj estas esence malsimilaj. En "The Universal Language" la gvidliniojn de la filmo donas la intervjuoj kun konataj esperantistoj kiel Humphrey Tonkin kaj Renato Corsetti kaj kun la lingvistino Arika Okrent. Ili donas realan bildon pri Esperanto kaj, kvankam la filmo traktas precize nek historion nek movadon, ĝi efike lokas Esperanton en la socia kunteksto, kie ĝi aperis kaj kreskis, kiam la ideoj pri socia planado estis pli kutima afero en la mondo.

Green mem ne estas esperantisto. Malgraŭ ke li havas bonan sintenon rilate al la lingvo kaj intervjuis nur homojn, kiuj apogas Esperanton, lia filmo ne estas propaganda. Ĝi montras al ni esperantistoj, kiel la mondo vidas nin. Eble kelkaj protestos ke la filmo apenaŭ montras la aktualan E-movadon, sed kio estas vere montrinda kaj impresa nuntempe por la mondo? Eble la plej junaj generacioj de esperantistoj (al kiu mi apartenas) ne tre atentis, sed oni ne povas forgesi ke la bazon de la E-movado konstruis homoj, kiuj firme kredis aŭ daŭre kredas je la fina venko. Ĉi-kuntekste Green montras la seniluziigon de veterana esperantisto, kiu antaŭ la dua mondmilito firme kredis ke



Esperanto fariĝos ĉies dua lingvo. Kun la verda flago en la manoj kaj tremanta voĉo li asertas ke fine la angla lingvo venkis.

Laŭ teknikaj aspektoj ĝi estas senriproĉa – belega fotografio kaj fona muziko. Eble se ĝi estus pli longa ĝi perdus je intereso. Ĝi estas simpla filmo kaj eble ĝia sekreto kuŝas en ĝia senpretendeco. Jes, post re-spekto mi havis pli bonan impreson. Mi povis kapti en ĝi poeziecon, kiun nur kun pli da tempo mi povis kompreni. Sam Green estas ne nur talenta sed verŝajne nun iom pli "verda" ol kutime. ■

Rogener PAVINSKI

Do, jes ja!

"Nu, kaj do?"

Kolekto de rakontoj kaj eseoj, verkita de Sen Rodin.

Eld. EXIT, 2010

La libreto kun iom filozofia titolo (ĝia senco iĝos klara nur meze de la libro) enhavas iom malpli ol tridek malgrandajn kaj mezgrandajn "rakontojn, raportojn, recenzojn kaj revojn", kiel estas skribite sur la titolpaĝo. Ilia aŭtoro (mi senvualigu la sekreton: malantaŭ la plumonomo kaŝas sin Filippo Franceschi) estas fervora kaj konvinkita esperantisto – tial Esperanto ludas ne la plej lastan rolon en tiu kolekto.

Tamen, mi komencu laŭ la ordo. La unuan parton de la libro konsistigas beletraj rakontoj. Ilia allogeco varias (kelkaj ŝajnas al mi eĉ tedetaj pro tro mallonga intrig-evoluo, sed multaj estas vere atentokaptaj kaj spritaj), sed apartan spicon al ili aldonas la fakto, ke multaj (eble eĉ ĉiuj) estas almenaŭ parte membiografiaj. Nemalofte en tiuj rakontoj la aŭtoro priskribas kaj priridas la absurdaĵojn de la moderna mondo – temo ja proksima al ĉiu, kiu loĝas sur nia planedo.

La duan, proksimume same grandan, sed,

ŝajnas al mi, pli gravan kaj interesan parton de la libro konsistigas diverstemaj eseoj kaj rememoraĵoj. Jen temas pri la rumania urbo Cluj-Napoca, jen pri la recenzoj por kelkaj libroj kaj filmoj. Foje temas pri la reago de la aŭtoro al eventoj de la ĉirkaŭa mondo (la elekto de Barack Obama kiel prezidento de Usono aŭ la rilato de la itala komunisto Antonio Gramsci al Esperanto). Tamen la plej interesaj kaj atentokaptaj eseoj temas ĝuste pri nia lingvo internacia. La aŭtoro firme certas kaj trafe argumentas pri la viveco de Esperanto kaj pri ĝia granda estonteco – eĉ se foje la ĝisnunaj sukcesoj de Esperanto ŝajnas magraj. Miaopinie, la plej "forta" ero de la libro estas la eseo "Nu kaj do?" – ĝin mi sincere konsilas tralegi al ĉiu esperantisto, speciale al tiuj, kiuj dubetas aŭ senesperigas pri la poresperanta agado. Ankaŭ en tiu ĉi parto ne mankas iom satiraj kaj spritaj kontribuoj.

La lingvaĵo de la rakontoj estas ĝenerale bona, sufiĉe klara kaj facila. Tamen, ankaŭ malglataĵoj troveblas: kelkfoje mi kaptis iom strangajn sintaksajn konstruojn, iom strange impresis min la oftega uzo de la vorto "kozo" ekster la filozofia kunteksto (kiam tute bone taŭgus "aĵo" aŭ "afero"); ankaŭ pri la tempo de



la partipoj la aŭtoro aŭ redaktanto foje pekas (ekz., "petegadis esti mortigota" anstataŭ la bezonata "mortigita"). La preseraroj malmultas, fine de la libro enestas negranda erartabelo.

La ĝenerala impresoj pri la libreto estas ja bona – la ŝatantoj de malgrandaj rakontoj kaj eseoj certe estos kontentaj. Ankaŭ la intelekta komponanto estas sufiĉe granda kaj pensiga. Tial al la ĉefa demando, starigita de la aŭtoro kaj uzita kiel librotitolo (en la responda eseo ĝi estas uzata kiel preterira respondo al negatavaĵoj), mi certe respondas: "Do, jes ja, sinjoro aŭtoro! Mi plene subtenas viajn esperantistajn entuziasmon kaj sintenon!" ■

Paulo MOJAJEV - Ukrainio

La turo de Sauron

La alveno ĝis Mordor estas malfacila, doloriga kaj al malmultaj destinita.

Froto, la Hobito el La Majstro de la Ringoj, tre bone scias tion – samkiel la usonano de la supra foto. Per miloj el LEGO-pecoj kaj iom da kreemo, Kevin Walter kreis la turon de Sauron, Barad-Dûr, 1,8 metrojn altan.



La angla lingvo kiel "internacia"


VALENTIN MELNIKOV - RUSIO

Kiu asertas ke "la tuta mondo parolas angle"? Ke la angla estas "la" internacia lingvo kaj se oni scias ĝin, oni ĉie ajn orientiĝos senprobleme? Ke la angla lingvo estas facila kaj oportuna?

La urbo Sankt-Peterburg dum pli ol 200 jaroj estis la ĉefurbo de Rusio. Nun oni ofte nomas ĝin la "kultura ĉefurbo de Rusio".

Kiel ĉiu granda urbo, ĝi havas metropolitenon (urban subteran fervojon). Antaŭnelonge oni decidis por oportuneco por eksterlandaj turistoj aldoni anglalingvajn indikilojn. Certe estis elspesita granda monsumo kaj jen la rezulto:

Ruse estas skribite "iru laŭ maldekstra flanko"!



En la angla: "iru dekstren"

Ne al atomenergio

DIETER ROOKE - SVISLANDO

POLEMIKO

Hiroŝimo, Nagasako, Ĉernobilo, Fukuŝimo. Jen la nekompleta listo de nukleaj katastrofoj. Kiom da vanaj elspezoj – kiom da viktimoj de neregebla teknologio? Kiom da atombomboj kaŝe stokitaj por eventuala nova „milito de la steloj“ – proklamita de Usono? Dum la t.n. Malvarma Milito eĉ la „paca“ svislanda popolo voĉdonis por akiro de atomarmilaro. Sed la registaro ne plenumis la deziron kun la promeso de militistoj ke eblas en tri monatoj produkti la atombombon per la uranio uzata en atomcentraloj.

La lastan monaton la svisa parlamento decidis ke ankoraŭ necesas konstrui bunkrojn por ŝirmi la popolon kontraŭ nukleaj akcidentoj kaj atakoj de teroristoj. Ankaŭ en mia laborejo ekzistas bunkro – sed ĝi estas uzata por teni fatrasojn. Ordinara svisa civitano uzas la spacon por meti sportajn ekipaĵojn aŭ ne plu uzindajn vestaĵojn. Laŭ severa leĝo ĉiujare oni tamen testas la atomsirenojn.

En la jaro 1986 okazis la terura atomakcidento de Ĉernobilo en la tiama Sovetunio. Ĝi anatemis la finon de la reĝimo. La kostoj por regi la katastrofon estis enormaj, riskis siajn vivojn centoj da laboristoj, tuj mortis multaj el ili. La regiono ne plu loĝblas dum jardekoj pro la radioaktiva radiado. Suferadas pro seriozaj malsanoj sennombraj civitanoj. Nur sovaĝaj bestoj vagadas ĉirkaŭ la sarkofago, kiu kovras la ruinojn de la iama altteknika monumento. Nia samideano el Ĉeĥio sarkasme rekomendis viziti la allogan vidindaĵon – la ĉerkon radiantan, okaze de la IJK en Kievo [1].

Ĉu ripetiĝas la historio el antikvaj regnoj? Konstruiĝis sarkofago ne plu por konservi kadavron de faraono – sed por mumiigi ruinojn de nuklea centralo. Pli draste – eĉ necesas konstrui duan sarkofagon super la unua, ĉar la haste konstruita sarkofago de Ĉernobilo ne plu retenas la radioaktivecon.

La svisa civitana movado kontraŭ atomcentraloj kaj atommilito fondiĝis jam multe pli frue pro la danĝero de nuklea milito, kiu ka-

pablis detruiri nian tutan planedon. La unua, tre granda manifestacio kontraŭ konstruo de atomcentralo okazis en la vilaĝo Kaiseraugst, apud la urbo Bazelo. La protesta movado sukcesis, la atomcentralo ne konstruiĝis. Sed en aliaj lokoj, kie ne okazis protestoj, estis tamen trudita atomcentraloj al civitanoj. Pro senĉesaj paneoj en la funkciado de atomejoj kreskis la konscio kaj la protestoj kontraŭ tiu teknologio. Neniu loko en Svislando estis trovita por teni sekure la restaĵojn dum jarcentoj radiantajn.

En iu komunumo de Svisio oni trifoje pelis la civitanojn por demokratie decidi pri eventuala stokado de nuklea materialo. Sed trifoje la loĝantoj rifuzis tiun intencon. Pasie estis disputata la demando pri la neceso de atomenergio, la riskoj kaj avantaĝoj. Pro tio estis fondita la laŭmoda verda partio. En la parlamento la burĝaj partioj defendis la atoman industrion – ekzistas forta lobio de entreprenistoj – kaj la maldekstraj partioj esprimis sin plejparte kontraŭ la atoma tekniko. Iufoje la popolo voĉdonis por „morratorio“, t.e. ne plu konstrui novajn centralojn. Sed ĉi-jare (antaŭ la kaptismo en Japanio) en la kantono Berno, la voĉrajtaj loĝantoj decidis per hazarda plimulto de 50,1 % esplori la kondiĉojn por starigo de nova konstruaĵo.

Post la grava incidento en la japana Fukuŝimo preskaŭ neniu plu kuraĝas pledi por nuklea energio – kvankam jam estis terura la leciono

el Ĉernobilo. Ŝanĝiĝis la politiko eĉ de la burĝaj registaroj en Germanio kaj Svislando. La svisaj kvin ministrinoj kaj du ministroj decidis ne plu utiligi nuklean energion, kaj malkonstrui la atomcentralojn, sed kun prokrasto ĝis la jaro 2034 por la plej lasta.

Tial okazas grandnombraj manifestacioj kun dekmiloj da svisaj popolanoj. Oni postulas tujan senprokrastan fermon. En la ĉefurbo Berno, lernejoj strikis kaj manifestaciis sur stratoj. Antaŭ la domo de la elektra kompanio ili starigis tendaron kaj organizis biciklan manifestacion al la atomcentralo „Mühleberg“ je distanco de 20 kilometroj de la ĉefurbo. La prezidento de Svislando, s-ino Calmy Rey, publike deklaris la finon de la nuklea epoko. Ŝi sekvis la politikon de la germana konservativa partio, ĉe-pinte la kanceliero, s-ino Angela Merkel.

En sia parolado ŝi skizis la perspektivon sen nuklea energio: Jam estas vaste utiligataj la naturaj riĉaj fontoj. Kelkaj el ili estas nomeblaj ekologiaj, ekz. suna, venta, akva, tajda kaj terma energioj. Sed aliaj estas nerenovigeblaj, kiel karbo kaj tergaso. Tial necesas esplori novan teknologion, trovi novajn sekurajn energifontojn. Tio estos granda ŝanco por plua progreso, kaj granda profito por la homaro.

En mia eta vilaĝo „Oensingen“ antaŭ nelonge estis konstruita nova elektrocentralo. Ĝi kombinas akvo-purigejon kun kompoŝtejo. El la du organikaj materialoj eblas produkti naturan gason kaj ekspluati varmon por hejtado de domoj. Tute certe estas granda defio la trovo de novaj fueloj, sed necesas anstataŭigi la neregeblan kaj tro riskan nuklean teknologion.■

[1] Kontakto nr-o 238 (2010:4)

KONTAKTO

Sal!!!

La somero finiĝis. Ni devis reveni en la lerneajn benkojn kaj malantaŭ la tablojn en niaj laborejoj. Pri la someraj vojaĝoj kaj aranĝoj restis nur rememoroj. Kaj ĝuste tiu ĉi eldono de TEJO-Tutmonde helpas al vi rememori kaj denove en pensoj travivi la belegajn momentojn precipe dum la 67a Internacia Junulara Kongreso (IJK). Kaj se vi ne partoprenis ĝin? Do simple vi povas almenaŭ per niaj paĝoj el senti ĝian etoson.

En mia raportaĵo mi strebis peri almenaŭ ion el la IJK. Pri ĝi estis multaj plendoj, sed mi kredas, ke pli multaj estis la kontentaĵoj. Mi konscias, ke kelkaj fuŝaĵoj estis, sed mi venis por ĝui la etoson. Mi rakontos pri tio, kio plej multe plaĉis al mi. Sed ne ĉion mi povis priskribi – pro manko de spaco. Do jen la rezulto: Mi dankas al la organizintoj por la belega kongreso!

Sed se mi parolas pri plendoj, donu ni spacon ankaŭ al ili. Carolin


Weemeyer, 29-jara instruistino el Germanio, pripensas, kio bezonatas por bona IJK.

Dum la kongreso estis elektita nova estraro de TEJO. Pri ĝiaj planoj mi parolis kun Łukasz Zebrowski, novelektita prezidanto de TEJO. Kaj iusence li estas eĉ la lasta prezidanto! :-)

Kaj ni ne restu nur en Ukrainio. Ni vojaĝu ankaŭ al Kubo, kie okazis la unua JuSKA. Kio ĝi estas? Legu la koncernan artikolon!

Agrablan kaj ĝojigan varmigon en koro dum malvarma aŭtuno, dum vi legas niajn paĝojn, deziras al vi.

Dan.



Ĉu iom fuŝa? Tamen bonetosa!


DAN MRÁZEK - ĈEĤIO

La plej atendita aranĝo inter esperantistaj gejunuloj de la nuna jaro jam estas malantaŭ ni. Ekde la 14a ĝis la 21a de julio en la ukrainia ĉefurbo Kijivo okazis la 67a Internacia Junulara Kongreso (IJK), kiun partoprenis 311 homoj el 30 landoj. La partoprenantoj povis aŭskulti diverssternajn prelegojn, dum multaj ekskursoj promeni en la belega urbo, amuziĝi dum koncertoj, diskotekoj kaj ludoj kaj – memkompreneble konatiĝi kun novaj amikoj el interesaj landoj. Dum la ĉi-jara IJK kunsidis ankaŭ la komitato de TEJO kaj elektis novan estraron – prezidantiĝis Łukasz Zebrowski el Pollando.

En Kijivon mi alvenis kun karavano matene ĵaŭde la 14an de julio. Ni estis atenditaj de la organizintoj jam en la stacidomo, do la kongresejojn ni povis atingi tute senzorge. Ni konatiĝis kun la kijiva metroo kaj ankaŭ kun „marŝrutkoj”, lokaj malgrandaj busetoj, kiuj por la urba trafiko ege gravas kaj kun kiuj ni poste renkontiĝadis ĉiutage. Por mi, laca fremda nespertulo kun grandaj valizoj, la pli ol duonhora vojaĝo per „marŝrutko” estis – kiel diri – iom malkomforta. La busetoj tre tremas kaj ne havas klimaton. Ĝi ege utilis, ĉar en Ukrainio estis varmege. Sed, kvankam post la unua vojaĝo mi tion ne kredis, dum la semajno mi kun „marŝrutkoj” amikiĝis.:-)

Mi nun transsaltu la akceptadon (kiu fakte ekfunkciis vendrede), niajn lokiĝadon kaj esplorojn de la lokaj vendejoj, mi eĉ transsaltu la salutadon kun geamikoj, kiujn mi jam delonge ne vidis, kaj tuj mi diru pri la unuaj programeroj. Ĵaŭde posttagmeze ni enbusiĝis (en luitan komfortan buson nur por IJKanoj) kaj veturis al la urbocentro unue por la gazetara konferenco, due por la solena malfermo. Danke al la gazetara konferenco eksciis pri la IJK ĵurnalistoj kaj i.a. estiĝis belega telvid-raporto. Post la konferenco venis tempo por la solena malfermo, dum kiu estis prezentitaj ukraina folkloro sed ankaŭ moderna muziko, ukrainiaj tradiciaj muzikinstrumentoj, kaj dezirantoj povis ellerni iun ukrainian dancon.

Post la fino de la programo ni revenis al la kongresejo. Laŭplane devis forveturigi nin du grandaj klimatizitaj aŭtobusoj, sed unu buso difektiĝis. Do ni havis du eblojn. Aŭ atendi ĝis la ununura aŭtobuso revenos post forveturigo de parto el ni, aŭ veturi memzorge. Kun granda parto de la homoj mi decidiĝis por la pli rapida eblo – do por la memzorga vojaĝo. Memkompreneble per marŝrutko... La vojaĝon mi preskaŭ ne memoras, ĉar mi kaptis



Enirejo en monaĥejon de S-ta Pantalejmono - proksime de la kongresejo

Jaroslav Gennert

malagrablegan kapdoloron, do tuj post la alveno kongresejojn mi ekdormis kaj tial maltrafis la unuan koncerton.


Ek al la prelegoj (kaj ne nur kiel aŭskultanto)

Denove mi „reviviĝis” vendrede. Tio jam estis regula kongresa tago (eĉ la akceptado funkciis!) kun interesaj prelegoj. Mi partoprenis prelegon de Veronika Poór kaj Rogier Huurman pri nova esperantlingva retradio Muzaiko. Veronika taskis al mi okazigi post ĝi prelegon kun konsilioj, kiel fari bonan intervjuon. Tio estis por mi iom neatendita, tamen post du horoj mi prelegi kapablis. Al la arto de radia ĵurnalismo estis dediĉita multe da tempo, ĉar la interesiĝantoj post mia „teoria” prelego povis praktike sperti la muntadon gvide de Johannes Mueller.

Sed ne nur pri ĵurnalismo okazis prelegoj. La kongrestemo estis „Daŭropova evoluo – nova koncepto por la homaro”, kaj ĉar ni estis en orient-kristana lando, dum alia prelego oni povis konatiĝi kun iu mirakla ikono.

Amuziĝo bezonatas

Ne eblas viziti



Eno de la preĝejo de S-ta Pantalejmono

Jaroslav Gennert

Ivo Miesen



Diskoteko

diskoteko, dum ludoj... Nu, venis ordinara vespera programo.

Se mi parolas pri ludoj, ne eblas ne menci la homlupan ludon, kiu estas unu el la plej ŝatataj ludoj inter esperantistoj. Ĉiutage (fakte ĉiunokte) atakis malgrandan vilaĝon la homlupoj kaj simplaj vilaĝanoj devis defendi sin. Sed ankaŭ la homlupoj ne volis morti, do iam okazis, ke la vilaĝanoj ne estis sukcesaj kaj pri la venko ĝojis homlupoj. Amantoj de la ludo ofte „homlupumis“ ĝis ege malfruaj noktaj (aŭ jam preskaŭ fruaj matenaj) horoj.


Sed laboro ankaŭ necesas

Ne ĉiuj povis ĝui nur amuzon dum la kongreso. Iuj venis ankaŭ por labori. Tiuj „kompatinduloj“ estis la komitatanoj de TEJO aŭ iliaj anstataŭuloj. Sabate antaŭtagmeze okazis la unua laborkunsido. Oni taksis la pasintan jaron kaj pritraktataj estis ĉefe temoj, kiel plividebligi TEJO-n kaj Esperanton. Eksonis ideo membrigi landajn organizojn en naciajn konsiliojn de junularo kaj pliriĉigi la Esperantan kulturon. Kaj kio estis la ĉefa – estis elektita nova estraro de TEJO. Jen la novaj estraranoj:

Prezidanto: Łukasz Zebrowski
Ĝenerala sekretario: Paulína Kožuchová
Kasisto: Alisa Nikitina
Informado: Sergeo Tyrin
Aktivula trejnado: Nico Huurman
Landa agado: Petra Smidéliusz
Eksteraj rilatoj: Michael Boris Mandirola
Kongresoj: Tina Tišljár

Tiom da lingvoj ekzistas en la mondo!

Dimanĉe ni profunde konatiĝis kun la urbo. Ĉar ne eblas vidi dum unu posttagmezo ĉion el la urbo kun ĉ. 5 milionoj da enloĝantoj, ni estis dividitaj je pluraj paralelaj ekskursoj. Kaj ĉiu ekskurso estis specialiĝinta pri io alia – iu pri preĝejoj, iu pri memoraĵoj... Ĉiu povis elekti, kio lin aŭ ŝin plej multe interesas.



Prelego

pri la lingvoj japana aŭ arpitana (minoritata lingvo en Francio, Svislando kaj Italio) kaj tre interesa estis prelego de Stephen

Ukrainion kaj ne gustumi lokajn trinkaĵojn (nu, ni diru eĉ drinkaĵojn). Por ke ĉiu povu havi tiun ĉisparton, vendrede vespere la kongresa drinkejo proponis senpagajn bierojn kaj vodkon. Iuj do trinkis, iuj drinkis, poste oni povis amuziĝi dum

Cobb el Usono, kiu pripensis, kial la angla lingvo iĝis internacie uzata lingvo kaj ĉu ĝi taŭgas por tio. Ni estas ĉe Esperanto-kongreso, do la rezulto estas klara: Kvankam la anglalingvaj kulturoj estas ekonomie kaj militite la plej sukcesaj (precipe pro tio, ke tiuj kulturoj meritis pri disvastigado de la homaj rajtoj), kaj kvankam la angla lingvo relative facilas, tamen ĝi por la internacia komunikado ne taŭgas. Se oni volas paroli en ĝi altnivele, por la plejparto de la fremdlingvanoj tio ne eblas, preskaŭ ĉiuj eraras. La vere internacia lingvo bezonas havi fonetikan transskribon, ĝi devas esti sen komplikaĵoj, ĝi devas esti regula, facile lernebla, tamen samkvalita kiel naturaj lingvoj – kaj tio do estas Esperanto.

Ne eblas IJK sen koncertoj

Kongresanoj tion ne sciis, sed interesa estis ankaŭ la mardo. Tiam mi havis vivan telefonalkokon por Ĉeĥa Radio pri la IJK. Do eĉ la ĉeĥaj geaŭskultantoj eksciis, ke en Kijivo okazas kongreso de junaj esperantistoj. :-)

Mi ankoraŭ ne menciis koncertojn. Ili okazis ĉiuvespere kaj precipe ili estis bardaj – ekzemple koncertis Ĵomart kaj Nataŝa aŭ Paŭlo Moĵajev. Sed ankaŭ rokmuloj ne enuis. Per siaj kantoj la kongresantoj dancis Martin Wiese, Platano (el Pafklik) kaj memkompreneble ne povis manki koncerto de JoMo. Ĝuste li koncertis marde vespere kaj por siaj ravitaj favoruloj li devis aldoni multajn kromajn kantojn.

Ĉiu renkontiĝo havas sian finon. Bedaŭrinde

Sed venis merkredo la 20a de julio, kiu estis la lasta tuta tago de la kongreso. Tradicie tio estis rekonebla dum la Internacia Vespere. Dum ĝi prezentiĝis ĉiuj, kiu volis, kaj montris al la kongresantoj ion el diversnaciaj kulturoj. Dum la programo adiaŭis kun ni la organizintoj de la kongreso kaj la kongresa flago estis transdonita al Akiumi Okabe, kiu alportos ĝin al Japanio. Ĝuste tie, en la urbo Tenri, okazos la 68a Internacia Junulara Kongreso venontjare.

Dum la vespero ĉiuj sentis, ke alproksimiĝas la momento de adiaŭo. La nokta diskoteko daŭris ĝis la mateno kaj pro tio multaj ekdormis nur por momento. Kaj jaŭde venis la fino. La fino de restado inter aro da homoj, kiuj malgraŭ la deveno el diversaj anguloj de la mondo, ĉiuj estis amikemaj. Tamen ili ĉiuj restos en la mensoj kaj koroj de ĉiuj, kiuj la 67an IJK en Ukrainio partoprenis.

Iuj restis ankoraŭ kelkajn tagojn por ĝui postkongresajn programojn aŭ en la Esperanto-insulo en Kijivo, aŭ en la Velura Sezono en Jalto, iuj veturis al Kopenhago por partopreni la Universalan Kongreson, sed multaj jam devis reveni hejmen en sia lando.

La 67a Internacia Junulara Kongreso apartenas al la pasinteco. Certe ĝi longe restos en niaj rememoroj. Kvankam estis iuj fuŝaĵoj aŭ fuŝaĵetoj (ekzemple ke dum la tuta kongreso ni ne povis lavi nin en varma akvo), la kongreso al mi ege plaĉis. La organizintoj meritas grandan dankegon kaj kun ĉiuj geamikoj (kaj novaj kaj malnovaj) mi deziras renkontiĝi se ne en la venonta IJK, do certe iam ĉe iu alia E-aranĝo! Ĝis tiam!



Gazetara konferenco

Jaroslav Gennert

Jaroslav Gennert

Ivo Miesen

La lasta prezidanto

Dum la 67a Internacia Junulara Kongreso estis elektita nova estraro de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo kaj nova prezidanto de ĝi iĝis Łukasz Zebrowski el Pollando. Espereble li ne estas la lasta prezidanto de TEJO, tamen iusence li vere lastas: Li estas la lasta prezidanto de TEJO, kiu estis elektita por du jaroj. Post sia elektigo, sidante apud la kongresejo, li donis intervjuon por TEJO-Tutmonde.

TT: Ni ne povas alimaniere komenci ol per la plej ofta demando en Esperantujo: Kiel kaj kiam vi esperantistiĝis?

ŁZ: Mi esperantistiĝis en 2003/2004. Enuiĝante dum Kristnasko mi serĉis iel en interreto kaj trafis hazarde Esperanton. Mi iomete interesiĝis, lernetis kaj poste estis invitita al kunveno de Pola Esperanto-Junularo (PEJ) kaj tie mi renkontis tiom bonegajn homojn, ke ne plu eblis forkuri.

Ĉu ĝuste la homoj estis tio, kio allogis vin al Esperanto?

Jes. Mi pensas, ke tio estas unu el la ĉefaj kialoj, kial oni restas ĉe Esperanto kaj ankaŭ min allogis ĝuste la homoj. Tiuj, kiujn mi renkontis surloke, tiuj, kiujn mi renkontis en diversaj aranĝoj... Vere interesaj homoj de la tuta mondo.

Ĉu vi sukcesis iun eĉ esperantistigi?

Mi siatempe instruis Esperanton en mia klubo, do estas kelketaĵoj homoj, kiuj restis de tiuj kursoj.

Ĉu vi do estis sukcesa instruisto?

Ne. Mi tute estas malsukcesa instruisto, mi ne vere kapablis instrui. Feliĉe pli kapablaj instruistoj en nia loka klubo transprenis tiun rolon, kiun mi faris dum du-tri jaroj antaŭe.

Vi nun estas prezidanto de TEJO, do tio estas tre alta nivelo en la Esperanto-movado. Kiel vi kreskis en tiun ĉi postenon?

En la Esperanto-movado mia ĉefa okupo dume estis organizo de eventoj aŭ mastrumado de organizoj. Do unue mi organizis Ago-Semajnojn kaj iujn kunvenojn de Pola E-Junularo, poste ankaŭ IJKn kaj JESn. Se temas pri organizoj, mi laboris en PEJ en diversaj funkcioj, ankaŭ en Pola Esperanto-Asocio kaj en Varsovia Vento. Tie mi kolektis miajn organizajn spertojn kiel mastrumi la organizon, kaj post la IJK en Liberec', kiun mi kunorganizis, oni elektis min en la estraron de TEJO por la posteno de respondeculo pri kongresoj, seminarioj kaj aktivula trejnado. Kaj nun, post du jaroj, la komitato de TEJO elektis min kiel prezidanton.

Ĉu vi memoras pri via unua internacia Esperanto-renkontiĝo?

Mia unua serioza Esperanto-renkontiĝo estis Ago-Semajno en la 2004a jaro. Ĝi

okazis en Zakopane kaj partoprenis ĝin ĉirkaŭ 80 homoj, tiam la aranĝo ankoraŭ ne estis tiom granda. Tiu ĉi estis la aranĝo, dum kiu mi ekparolis Esperante vere. Antaŭe mi partoprenis PEJ-kunvenojn kaj ArKonEs, sed tio estis malpli grandaj kaj malpli longaj aranĝoj.

Kion alportis al vi tio, ke vi estas esperantisto?

Fakte dum tiom da jaroj Esperanto fariĝis kvazaŭ iu vivstilo, iu ĉefa motivo por ion fari. En Esperantujo mi trovis lokon, kie mi povas fari iujn aferojn kaj senti, ke ili estas utilaj. Do ne nur esti vivkonsumanto, sed doni ankaŭ ion al la ideo, kiun mi subtenas.

Nun ni iomete babilu pri via nova posteno. En kiu situacio vi transprenas TEJO-n?

Mi transprenas TEJO-n en sufiĉe bona situacio, tio estas agrabla afero. Ekzemple finance ni statas tute bone, kio ankoraŭ antaŭ iom da jaroj ne estis tiom bona. En plej multaj kampoj la situacio estas relative bona, sed kompreneble multon oni povas plibonigi, ekzemple en la kampo de kunordigado. Ĉi tio estas io, kio lastatempe fuŝiĝis. Oni povas plibonigi ankaŭ ekzemple la strategion pri homaj rimedoj aŭ la strategion pri seminarioj kaj aktivula trejnado. Do ekzemple pro tio ni proponis, ke oni disdividu la funkcion de seminarioj kaj aktivula trejnado disde kongresoj, ĉar estis tro okupa la posteno kaj nun oni povas koncentriĝi strategie ankaŭ pri tiu dua temo. Do estas certe multo plibonigenda, sed ankaŭ la nuna stato estas tute bona.

Kiel vi pensas, ke eblas pliriĉigi la kulturen vivon en Esperantujo?

La kultura vivo en Esperantujo jam nun ne estas malriĉa. Se temas ekzemple pri muziko, ĝi estas bona. Malpli bona ĝi estas, se temas pri literaturo, mi pensas. Estas ege malmulte da eldonaĵoj. Se temas pri tiuj aŭd-vidaj rimedoj, ili multe pliboniĝis danke al interreto. Aperas esperantlingvaj retaj radioj, do tio estas pozitivaĵo de la lastaj jaroj, ke tio disvolviĝis. Do se temas pri la kultura vivo, la ĉefajn mankojn mi vidas ĝuste en literaturo kaj eldonado, ĉar tio estas malpli facila en la nuna tempo.

Ĉu vi pensas, ke TEJO povas ŝanĝi ion tiukampe, ke ekzemple TEJO povas instigi homojn verki librojn?

Dum la lastaj jaroj TEJO ne multe okupiĝis pri kulturo, sed nun, babilante pri niaj planoj, pri tio, kion ni volas, ke estu en nia laborplano, ni konkludis, ke valoras ankaŭ pli multe okupiĝi pri kulturo, ol tio estis antaŭe. En la lasta estraro ne estis iu ajn, kiu okupiĝus specife pri kulturo. Sed nun, en la ĵus elektita estraro, la ĝenerala sekretario, Paulína Kožuchová, havos ankaŭ respondecon ĝuste pri kulturo.

La komitatkunveno dum la ĉi-jara IJK laboras en laborgrupoj. Kiuj estas tiuj laborgrupoj kaj kion ili celas?

Tio estis ioma modifo de komitatkunveno kompare kun la antaŭaj. Ni strebis, ke laŭeble multe oni laboru ne en plena komitata kunsido, sed en laborgrupoj. Simple pro tio, ke tio estas pli efika, ĉar ĉiukaze estas pri ĉiu temo nur iom da homoj, kiuj interesiĝas. Do pli bonas disdividi ilin. Dum ĉi-komitatkunsido ni havis ses laborgrupojn. Mi unue partoprenis en la grupo pri politikaj pozicioj de TEJO. Tiu grupo celis ellabori opinion de TEJO pri diversaj aferoj kaj tiuj opinioj poste servu kiel bazo por esprimi opinion de TEJO ekster de la movado. Ekzemple en Eŭropa Junulara Forumo, kiam oni voĉdonas pri iu afero, ne nepre rilata al la lingva politiko, sed al homaj rajtoj aŭ alia afero, necesas tiuj politikaj pozicioj, por ke ni sciu, kiel voĉdoni kun la akcepto de la komitato. Sekva grupo, kiun mi partoprenis, estis pri ŝanĝo de regularo kaj reglamentoj. Tiuj dokumentoj de TEJO bezonas vere profundan trarigardon kaj profundajn ŝanĝojn, ĉar ili estas plurloke malkoheraĵoj kaj ili estas ankaŭ sufiĉe malnovaj dokumentoj. Ni ankaŭ volas, ke venontaj estraroj kaj komitatoj oficu ne dum du jaroj, kiel nun, sed dum unu jaro, ĉar vivo de junuloj estas tre ŝanĝiĝema.

Kiel profitos el la nova estraro kaj el via prezidanteco la landaj organizoj de TEJO?

Ĉefe ili profitos de tio, ke TEJO baldaŭ havos sian dungitan oficiston. Tiu oficisto okupiĝos ĉefe pri financa mastrumado kaj pri subvencipetado kaj ankaŭ pri helpo al landaj sekcioj ĝuste en tiuj kampoj. Tiu projekto, ke TEJO havu sian oficiston, kreiĝis komence de la dumilaj jaroj kaj estis plurfoje traktata, kaj en nia lasta oficperiodo ni finfine sukcesis tiel antaŭen puŝi ĝin, ke tiu projekto finfine realiĝos. Do Manuela Ronco, kiu estos tiu oficisto,

povos multege helpi al landaj sekcioj en la kampo de subvencipetado, de mastrumado de projektoj ktp.

Ni ĉesu esti tiom seriozaj kaj parolu pri vi, kiel pri Ĥukasz. Kiuj estas viaj hobiaj, memkompreneble krom Esperanto?

Tio estas malfacile direbla, ĉar Esperanto rabas tiom da tempo de mia vivo, ke ĝi fakte krom laboro kaj studoj estas la ĉefhobio kaj ĉefokupiĝo. Krom Esperanto mi tre interesiĝas pri mia urbo, do pri Varsovio, mi tre ŝatas ekscii pri ĝi, promeni tra ĝi kaj foti ĝin. Profesie mi estas konstruĝinĝiero, mi laboras en firmao, kiu konstruas profundajn fundamentojn, do kompreneble ankaŭ konstruado estas io, kio tre interesas min.

Esperantistoj multe vojaĝas. Kiom da landoj vi jam vizitis, kaj kiujn?

Mi tute ne havas iun ajn kalkulon pri tio. Certe estas jam plejparto de la eŭropaj landoj, kiujn mi jam vizitis. Se temas pri ekstereŭropaj Esperanto-vojaĝoj, mi estis en Kubo lastjare, kie mi kunordigis la organizon de la kongreso. Sed el la ekstereŭropaj vojaĝoj ĝi estis la ununura esperantista. Mi estis en Turkio, Egiptio kaj Tunizio, sed tio estis simple turismaj vojaĝoj.

Kiu lando surprizis vin?

Estas kelkaj landoj, kiuj surprizis min. Nun ni estas en Ukrainio kaj tiu ĉi lando certe surprizis min. Ne nun, sed en la jaro 2005, kiam mi estis ĉi tie por la unua fojo. Ĝis tiam mi estis vizitinta ĉefe okcidenteŭropajn landojn, do kiam mi iris al Ukrainio, mi sentis min iomete kiel en alia mondo. Sed la plej nekutima kaj nekonata por mi estis certe Kubo, kiu vere estis kiel absolute alia mondo. Ni povis senti nin kvazaŭ en lernolibro pri la historio de orienta Eŭropo antaŭ dudek jaroj. La vivo de homoj en Kubo estis vere mirinda afero. Tie vivas homoj tiom feliĉaj malgraŭ malfacilaĵoj, kiujn ili frontas ĉiutage.

Kaj la lasta demando: Kion vi ŝatas manĝi? :-)

Mia plej ŝatata manĝaĵo estas „pierogi“. Temas pri iu formo de pastaĵo kun farĉo ene, plej kutime boligita aŭ eventuale fritita. Kaj miaj plej ŝatataj nomiĝas „pierogi ruskie“, do rusaj pirogoj, malgraŭ ke ili estas polaj, sed de orienta Pollando. Ili havas farĉon faritan de terpomoj, kazeo kaj cepo.

Dankon por via tempo.

Dankon al vi.

Ni estas ĉe Facebook!

Aliĝu al nia grupo TEJO-Tutmonde kaj komuniku kun ni kaj konigu viajn interesojn!

Ĉu vi volas esti informata aktuale?

Jen por vi ekzistas blogo de TEJO Tutmonde ĉe www.tejo.org. Ĝia adreso estas: <http://www.tejo.org/ea/blog/8543> Tie vi trovos la plej aktualajn informojn pri junulara agado tutmonde!

Vi estas niaj legantoj, ni estas via gazeto!

Kontaktu nin kun viaj demandoj, kontribuaĵoj, kritikoj (laŭdoj :-)), rimarkoj ktp. al tejo-tutmonde@tejo.org!



TTT-tejo: www.tejo.org

Ĝeneralaj informoj pri TEJO

TEJO estas mallongigo de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo. Ĝi estas la junulara sekcio de UEA, la Universala Esperanto-Asocio. TEJO popularigas internacian kompreniĝon per renkontiĝoj, edukaj programoj kaj uzo de internacia lingvo, Esperanto. La organizo defendas kulturen riĉecon de lingva diverseco, homajn rajtojn de lingvaj minoritatoj kaj tutmondan kompreniĝon per facila aliro al internaciaj kontaktoj. Uzo de Esperanto estas la kadro de niaj klopodoj.

Centra Oficejo de UEA/TEJO

Nieuwe Binnenweg 176 - NL-3015 BJ Rotterdam - Nederlando
Tel.: (01 0) 436 1 044 - Faksilo: (010) 436 1 751 ,
Retadreso: oficejo@tejo.org

Estraro de TEJO

Ĥukasz ZEBROWSKI – prezidanto, kunordigo, homaj rimedoj - lukasz@tejo.org
Paulina KOŖUCHOVÁ – ĝenerala sekretario, kulturo - paulina@tejo.org
Alisa NIKITINA – kasisto, financoj, subvencipetado - alisa@tejo.org
Sergej TYRIN – unua vicprezidanto, informado - sergeo@tejo.org
Michael Boris MANDIROLA – dua vicprezidanto, eksteraj rilatoj - michael-boris@tejo.org
Nico HUURMAN – tria vicprezidanto, aktiva trejnado, seminarioj - nico@tejo.org
Tina TIŠLJAR – estrarano, kongresoj - tina@tejo.org
Petra SMIDĤIUSZ – estrarano, landa agado, edukado - petra@tejo.org

Membroservoj de TEJO

Kiel membro de TEJO vi ricevas:

- la revuon Kontakto kun la rubriko TEJO-Tutmonde
- rabaton por la Internacia Junulara Kongreso
- eblon partopreni en seminarioj
- eblon engaĝiĝi en interesa kaj internacia agado kaj tre grave: vi helpas al la junulara movado de Esperanto!

Se vi aĝas pli ol 30 jarojn kaj volas ĝui la samajn avantaĝojn (kaj revuojn) kiel membroj de TEJO, kaj aldone subteni TEJO-n, vi estas bonvenigata fariĝi Patrono de TEJO. (Pliaj informoj sur www.tejo.org/patrono aŭ demandi ĉe la Centra Oficejo).

Agado de TEJO

La agado de TEJO konsistas precipe el:

- informado en junularaj medioj pri la lingva problemo en internaciaj rilatoj kaj pri ĝia solvo per Esperanto
- praktika utiligo de Esperanto je la servo de la junularo kaj informado pri tio en junularaj medioj
- okazigo de kongresoj, konferencoj, seminarioj kaj aliaj kunvenoj
- instigado al la membroj de TEJO aktive partopreni en la Esperanta movado.
- Aktiva Trejnado (pli da informoj ĉe www.tejo.org/aktivula_trejnado)
- Eldono de Pasporta Servo (www.pasportaservo.org), la adresaro de gastigantoj kiuj pretas senkoste gastigi esperantistojn; ĉiujare aperas ĝisdatigita eldono.

Subtenu la agadon de TEJO

Ekzistas multe da ebloj helpi TEJO-n en ĝia agado. La plej gravaj estas membriĝi aŭ patroniĝi.

Sed vi ankaŭ povas helpi al konkretaj agadoj de TEJO. Mondonacojn al ĝenerala agado de TEJO bv. pagi al la UEA-konto "tejtej" (indiku la celon de donaco, ekz: "donaco por KER" aŭ "donaco por landa agado"). Eblas donaci ankaŭ tiel por specifaj celoj:

- Fonduso "Partoprenu IJK-n" – TEJO per ĝi subvencias la partoprenon de TEJO-aktivuloj al IJK
- Pasporta Servo – eble la plej fama eldonaĵo de TEJO

Por pliaj detaloj pri pagmanieroj, bv. rigardi ĉe www.uea.org/alighoj/pag_manieroj.html aŭ demandi ĉe la Centra Oficejo.

TEJO dankegas vin pro via subteno!

27 ARKONES



aŭspicioj
tejo

ARTAJ KONFRONTOJ en ESperanto
www.arkones.org

23-25 de septembro 2011
Poznań, Pollando